

Turka Stelo



SALUTON,

al ĉiuj de niaj legantoj el pluva aŭtuno. Post la varma kaj seka somero ĉi tiu malvarmeta kaj pluva aŭtuno estas ĉio, kion oni ŝatus vidi.

Estas du poemoj pri pluvo kaj pluvanta vetero en nia 71-a numero de Turka Stelo. Unu el tiuj estas la poemo "Griza" de nia kara kontribuanto Antanas Vaitkevičius el Litovio. Rigardu kun kia bela rimo kaj mezuro li sukcese priskribas tiajn tagojn:

*Kornikoj kaj nuboj en griza ĉielo
Dancadas laŭ fluto de l' pluva venteg'
Forpasis somero senzorga kaj bela,
De l' griza aŭtuno komencis la reg'.*

*Kunpremas animon la fluto de l' vento
Kaj koron invadas malklara dolor'
Kaj sentas mi certe dum eta momento,
Ke pluvas,... ke pluvas... Jes, pluvas - en kor'.*

La alia kaj bela poemo "Pluvo" estas de nia kara kontribuanto Ivanička Maĝarova el Bulgario. Bonvolu legi ĝin en la sekvantaj paĝoj ĉar ĝi estas pli longa, por ke ni metu ĝin ĉi tie.

En nia 71-a numero estas denove multaj belaj kaj interesaj tekstoj, poemoj, ŝercoj, krucvortenigmoj ktp por vi.

Bonvolu legi ilin hejme kaj protektu vin el la viruso, kiu ankoraŭ furoras ekstere en la startoj kaj lokoj kiel restoracioj, kafejoj ktp.

Ni deziras sanon kaj kuraĝon al vi.

Bonan legadon al ĉiuj !

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Alvoko	2
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Tempo Sigelita	5
ALCESTISA kaj ADMETO (ΑΛΚΗΣΤΙΣ και ΑΔΜΗΤΟΣ)	6
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	9
La Lasta Leciono (2/2)	10
El la literaturaj paĝoj de MAS	11
Grandsinjoro	13
Poemo de Odilon	13
Misteroj - Elpensita aŭ vera? (1)	14
Pluvo	15
EKTRA 2021 - Poezio - Maja	15
Eŭropa Trajno	15
La Polino - parto 1	16
La Lasta Diino	18
La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj (7)	19
Ŝercoj	21
Krucvortenigmo	21
Letero de mia Amiko	22
Griza	22
Facilaj artikoloj el UEA.FACILA.ORG retejo	23
Esperanto: lingvo nur principe ĝena por kapitalistoj kaj imperiistoj (parto 1)	24
Bruo... Bruo... Bruo...Mi ne aŭdas min pensi	26
KIE FELIĈO	27
KNABO DEMANDAS HUNDON	27
Papilioj	27
Pri la divido per "ses"	28
Amika poŝto kun Helga Plöetner	28
Patro	29
Solvo de la krucvortenigmo	31
Facilaj rakontoj	32

Kursoj



En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj. Pro la kronviruso kaj kvaranteno estas neniu ebleco aktivi pri Esperanto lingvo.

Pasint vintre ekde la 22-a de novembro 2020 ni komencis serion de retaj kursetoj, ĉiu 30 minutojn longa, ĉiusemajnaj, pere de google.meet, pri diversaj gramatikaj punktoj de Esperanto. Temoj kaj iliaj planitaj datoj estas la jenaj:

22/11 Akuzativo, 29/11 Transitiveco

06/12 Parteciploj, 13/12 Korelativoj

20/12 Prepozicioj, 27/12 Sufiksoj

03/01 Refleksiva pronomo: Si

<https://edukado.net/kursejo?kid=27268>

Ĉe Burdur Mehmet Âkif Ersoy Universitato okazas Esperanto-lingvokurso nome "Esperanto Dili" kiel oficiala registrita universitata kurso elekta de studentoj el diversaj fakultatoj. La kurson gvidas la univiersitata matematika instruisto Utku Gürdal. Al la kurso aliĝis 15 studentoj.

<https://edukado.net/kursejo?kid=27360>

Alvoko

Mi bezonas
veki la semon
de l'interna suno
ade dormanta
ene de mi.



La rutino silenta
ties komfortan
dormon nutras.

Sed transcendo
estas la plej granda urĝo
de mia vivsoifo.



de Maria Nazaré C. Laroca

26/11/2013 Juiz de Fora, Brazilo

Fonto: <http://nazarelaroca.blogspot.com/2013/11/apelo- Alvoko.html>

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



La 71a Internacia Esperanto-sumoo

Inter la 12-a kaj 26-a de septembro okazis la 71-a Internacia Sumoo, en

kiu partoprenis 333 homoj el 30 landoj kaj 1 regiono. Ekde la unua Sumoo en septembro 2009 ĝis nun partoprenis entute 15.018 homoj. La legitaj paĝoj estis 900.000 (preskaŭ 4.500 libroj konsistantaj 200 paĝoj).

Laulandaj partoprenintoj:

- Japanio 62
- Francio 40
- Koreio 37
- Brazilo 34
- Ĉinio kaj Pollando 19
- Germanio 18

Esperanto-sumoo kontribuas al:

- Plialtigo de Esperanto-kapablo de esperantistoj
- Pliŝatigo al Esperanto
- Libro-kulturo kaj pli da vendado de Esperanto-libroj
- Solidareco de esperantistoj, kiuj legas samtempe en la mondo

La novembro 72-a Esperanto-Sumoo okazos la 14-an de novembro dum 2 semajnoj.

Mi atendas vian aliĝon.

HORI Jasuo

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

UEA



N-ro 986 (2021-09-30)
**Mesaĝo de UEA
okaze de Internacia
Tradukada Tago
2021**

La 30-a de septembro estas la Internacia Tago de Tradukado, kiam Unuiĝintaj Nacioj honoras tradukistojn kaj interpretistojn tra la mondo, esprimante subtenon al ilia grava sed ofte nevidebla, aŭ eĉ mistraktata, laboro de [...]

N-ro 987 (2021-10-08)

Eks-prezidanto de UEA ricevas ŝtatan premion en Barato

Ĉi-jare, la Premio Vidyasagar estas por la unua fojo aljuĝita al esperantisto. Tiun ĉi premion, rilatantan al la tuta verkaro de la respektivaj aljuĝitoj, la registaro de la gubernio Okcidenta Bengallando (en Barato) lanĉis en 1980 honore al [...]

N-ro 988 (2021-10-14)

TEJO en Speciala Konsulta Rilato kun UN

La Komitato pri Ne-Registaraj Organizoj (NRO) en sia Regulara Kunveno de 2021, laŭ kunsidoj okazintaj inter la 17-a kaj 27-a de majo kaj en la 7-a de junio 2021, decidis rekomendi al la Ekonomia kaj Socia Konsilio (EKOSOK) de Unuiĝintaj Nacioj [...]

N-ro 989 (2021-10-16)

Partoprenu la oktobran viki-konkurson pri Ameriko kaj malkovru Vikivojaĝon, la novan fraton de Vikipedio

Ĝis la 31-a de oktobro 2021 esperantistoj verkas pri Ameriko por la Esperantaj Vikivojaĝo kaj Vikipedio. Krom kontribui por kvalita enhavo en Esperanto, oni povos gajni valorajn premiojn! Tio okazas kadre de la konkurso "Amerika monato" [...]

TEJO



19/10/2021

Partoprenu en filmeto de TEJO pri la Universala

Deklaracio de Homaj Rajtoj

TEJO volas krei filmeton pri la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. [...]

18/10/2021

Iĝu komisiito de TEJO pri UNITED

Ekde multaj jaroj, TEJO membras en UNITED por Interkultura Agado (United for Intercultural Action), tuteŭropa junulara reto [...]

16/10/2021

Intervjuo al Manu Guaroa, la nova TEJO-volontulo

Manu Guaroa estas la nova volontulo de TEJO en la Centra Oficejo en Roterdamo. Ekkonu lin! "Mi nomiĝas Guaroa Emmanuel González Cuevas, sed [...]"

11/10/2021

Ekkonu la novan TEJO-volontulinon Livia Noghi

Ni ĝojas prezenti al vi la novan volontulinon de TEJO Livia Noghi! Kiom da jaroj vi havas kaj de kie vi estas? Mi nomiĝas Livia, mi [...]"

08/10/2021

Kontribuu al junulara deklaro por konferenco de UN pri la Malplej Evoluintaj Landoj

Por konsistigi junularan deklaron, kiu estos uzata kiel plediga dokumento por influi la intertraktadajn procezojn [...]"

04/10/2021

Invitu IJK 2023 al via lando!

Kandidatiĝu kaj organizu kune kun TEJO la 79-an Internacian Junularan Kongreson en via lando en 2023! Por ke kandidatoj [...]"


Leteroj de niaj legantoj



Dankon al Konuralp Sunal pro lia elstara artikolo pri Jean-Paul Belmondo. Estas vere, ke Belmondo ofte tenis pafilon en sia mano— kaj uzis ĝin malavare. Tamen iuj el liaj plej gravaj filmoj ne temis pri violento sed pri profundaj emocioj. La talento de Belmondo estis tia, ke li povis ludi ampleksan gamon de roloj. Konuralp tre bone kunmetis ĉi tion en la artikolo.

Amike,

marioo, el Kanado



Kara amiko, dankon por la 70-a numero de la Turka Stelo. Mi kun scivolo tuj trafolumis ĝin kaj volonte plenlegos ĝin (se ne la tutan, certe kelkajn elektitajn artikolojn, ekz. pri Belmondo, kiu estis ankaŭ mia ŝatata filmaktoro).

Mi volus atentigi vin pri la sekva miso: En la Facilaj Rakontoj senditaj de J. Drahotová (lastpaĝe) estas prezentita la enkonduka sceno de la unuaktaĵo de Václav Havel Aŭdienco. Erare fine de la elektitaĵo estas skribite, ke ĝi estas el la "Apokrifoj" de Karel Čapek - tio ja ne veras. La aŭtoro de tiu ĉi unuaktaĵo estas (tiam ankoraŭ ankaŭ) nia prezidento Václav Havel, kiu estis la alta protektanto de la 81-a UK en Prago 1996. Se mi ne eraras, mi spektis ĝin ĝuste tie (malgraŭ ke en la Vikipedio mi ne trovis la mencion pri la sursceneja prezentado de tiu teatraĵeto). Libroforme eldonis ĝin la eldonejo KavaPech (<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=5148>, ne plu havebla).

Amike **Fejfi**, el Ĉekio



Elkoran dankon, karaj! Belega revuo!

Amike,

Maria Nazaré Laroca, el Brazilo



Dankon pro la aperigo de mia teksto pri Henry de Montherlant, sed tio estas mallongaj fragmentoj per modesta tradukinto. Sed plena teatraĵo de Montherlant jam aperis en Esperanto, esperantigita de André Cherpillod, eksterordinara erudito, kiu verkis dekojn da libroj en la franca kaj Esperanto pri plej diversaj temoj lingvaj kaj historiaj, plenaj je scioj kaj detaloj, ekzemple :

https://www.amazon.fr/Langues-agglutinantes-lesp%C3%A9ranto-Andr%C3%A9-Cherpillod/dp/2906134090/ref=sr_1_16?dchild=1&qid=1632999887&refinements=p_27%3AAndr%C3%A9+Cherpillod&s=books&sr=1-16

Tiu estas eble lia plej bela kaj profunda teatraĵo, la

titolo en Esperanto "La Mortinta Reĝino"

<https://katalogo.uea.org/index.php?inf=2557>

Kore via

Roland Platteau el Francio



Karaj,

koran dankon pro la nova revueto.

Koran dankon ankaŭ pro la prezentado de mia rakonto 'La Kimero' en la Turka Stelo.

Amike salutas vin

Klaus Friese el Germanio



Vian artikolon pri la muzikisto Mikis Theodorakis mi amegas. Jen kompetenta prezento: biografioj kun fotoj pri la muzikisto, la poeto, la kantistino. Kaj la originalo greka (kiun mi kapablas nur sone legi, sed dank' al via traduko, nun komprenebla.

Ĉi tiu estas jam de longe mia preferata kanzono, ankaŭ pro la mesaĝo de la poemo.

Mi konsentas: mia vivo (jam 87-jara) tia estis, estas, supozeble tia estos.

Ĉi tiun kanzonon mi povas aŭskulti adaptitan en la francan; se vi volas ĝin aŭskulti, jen:

<https://www.youtube.com/watch?v=wtZyeLgKyWo>

Salute!

Gersi Alfredo Bays el Brazilo



Estimata, mi elkore dankas pro la sendita lasta, oktobra numero de Turka Stelo. Ĝi, kiel ĉiam, estas ampleksa, belaspekta kaj interesa. Sukceson al vi en via nobla kaj modela laboro per kaj por Esperanto. Hodiaŭ mi sendas al vi mian novan rakonton "Letero de mia amiko". Amike via,

Laimundas Abromas el Litovio



Geamikoj,

Antaŭ ĉio akceptu mian saluton el la fora lando Ĉinio.

Unue, nun mi koncize prezentu min: mi, viro, e-nomo Gajo, ĉinlingva nomo Li Chuanhua (ideografie: 李传华), amas Esperanton kaj ŝatas foje verki kaj traduki iom da poemoj k.a.. Nun mi tre ĝojas konatiĝi kun vi kaj via revueto.

Ĉion bonan!

Tutamike

Gajo el Ĉinio

KINO KAJ PERFORTO

Mi tiel rigardas al la filmo-fragmentojn kaj al televidilo kaj mi vidas ardantajn pafilojn, renversitajn aŭtojn, superhomajn korpojn, drogojn, seksumadon, disfalantajn konstruaĵojn, eksplodantajn aviadilojn ktp ktp...



Perforto en kino ne estas nova. Ĝi estas tre, tre malnova fenomeno ankaŭ en homoj. Sed la diferenco de nia tempo estas la jena: Pere de la sennombraj amaskomunikiloj en nia tempo verŝiĝas en la cerbon de homoj 24-hore tage perfortado, seksumado, rapideco, drogoj kaj ĉiaj, tiaj “plezuroj”.



Kio pri tio? oni povus diri. Oni povas pensi, ke ne ĉiuj estas efektataj samgrade. Jes, mi ankaŭ spektis vaker-filmojn kaj aventur-filmojn ekde mia infanaĝo, mi estis impresita, sed mi ne fariĝis teroristo aŭ murdinto. Tamen mi pensas, ke milionoj da homoj ne kritike filtras tion, kion ili spektas.



Hodiaŭ, filmoj estas same efikaj kiel personaj - psikologiaj, genetikaj kaj sociaj faktoroj en individuaj perfortokazaĵoj en multaj landoj, precipe en Usono. Tio estas vero pri, kaj kino filmoj, kaj televidaj filmoj. Eĉ

legi detektivan literaturon, spekti detektivajn filmojn kaj dokumentariojn kun tia fervoro povas esti la pruvo de nia okulumista monda socio elrabita de perforto kaj krimo.



Produktantoj, reĝisoroj, aktoroj, verkistoj, kaj kompreneble la tuta publiko estas la provizo-postulo kreintoj de ĉi tiu, ne tiom senkulpa cirko de perfortado.

La giganta monda komunumo estas speco de Dr-o Frankenstein. Li kreis sian propran monstron per siaj propraj manoj. Krome, li tute ne plendas pri tio. Por li, murdo, perforto, masakro estas objektoj de plezuro spektado.

Mi ne scias kiom da homoj rifuzas esti spektantoj kaj partoprenantoj en ĉi tiu cirko de perfortado. Ĉar ĉi tiu ordo daŭras, tio signifas, ke ne estas grava reago aŭ malkomforto kontraŭ ĝi. Se la realaj bildoj de masakro kaj milito en televidaj novaĵoj ne ĝenas nin, la nuntempajn homojn, se ni estas jam al kutimiĝantaj al tio, ĉu la perforto en la kinejo tute ne efikas?



Konuralp Sunal
la 25-a de oktobro 2021
Büyükdada, Istanbul, Turkio

Ĉu la amo havas grandecon? ĉu oni povas paroli pri amo de natura aŭ de nenatura, de normala aŭ de nenormala grandeco? ĉu ĉia ajn grandeco de la amo estas mezurebla?

Al tiuj, unuavide strangaj demandoj, povas respondi nur la ĉefrolulino de tiu ĉi rakontado. Tamen, por atingi ŝin ni devas ekkiri el tre fora pasintaĵo.



Estis Apolono (Απόλλων), la splenda dio de la lumo, de la poezio kaj la artoj.

Li estis dio potenca, fiera, tamen samtempe li estis viro sentimentala kun konstante romaneca sentemo kaj animo delikata, animo de artisto!

Estas pro tio, ke, ĉiufoje kiam li ekamis iun virinon, li profundiĝis en pasio nekontrolebla. Apolono amis ĉiam arde, senmodere!

Tian amon li sentis kiam li konatiĝis kaj enamiĝis al Koronisa (Κορωνίς), tre bela reĝidino, filino de la reĝo de Flegio (Φλεγύα).

La geamatoj iĝis geamorantoj kaj longe ili ĝuadis sian amon, tamen, iam, Apolono devis iri al Delfoj (Δελφοί), do, li foriris, promesinte al sia amatino ke li nepre revenos post nelonge.

La vero estas, ke li iom malfruiĝis, do, unu tagon, atingis lin la malagrabla informo, ke lia amatino estas preta edziniĝi kun Isĥo (Ισχυς), reĝido de Arkadio (Αρκαδία).

La teruran novaĵon alportis bela, tute blanka korvo, kaj oni ne supozu ke mi eraras, ĉar estas vere, ke tiam la korvoj estis brile blankaj. Tamen, estas sciate, ke ordinare la alportanto de malagrabla novaĵo estas tiu, kiu plej alt-preze pagas por la sekvoj el la anoncita informo. Tiele, Apolono, kun la koro frakasita kaj la vira honoro forte vundita, malbenis la tutan genron de la korvoj, ke ili estu nigraj, pli nigraj ol estis tiam lia koro!

La fortan doloron sekvis senbrida kolero kaj, kompreneble, la tiele ofendita, majesta dio, ne restis

senaga; li nur celis kaj per siaj neeraripovaj oraj sagoj mortigis la novgeedzojn dum la brila edziĝofesto!

Li punis la adultulinon, kaj nur tiam li eksciis ke lia mortigita amatino estis graveda je lia infano. La konfuzita dio urĝe petis la helpon de diaĵoj respondaj pri akuŝaj aferoj, tiele la bebo estis savita kaj liverita al ĝia patro.

Apolono, kiu, kiel ĉiuj dioj, estis akirinta multajn geidojn, tute aparte amis tiun sian filon, al kiu li donis la nomon Asklepio (Ασκληπιός). Li liveris lin al la centaŭro Kirono (Χείρων), la plej erudicia, plej saĝa kaj ĉioscianta vivulo, pedagogo de la plej brilaj herooj kaj duondioj.

Asklepio, sub la edukado de la saĝa Kirono, iĝis la plej bona kuracisto de la mondo. Li iĝis la unika terapiisto, kiu povis neniigi ĉian ajn vundon kaj malsanon. Per siaj metodoj kaj medikamentoj li nepre resanigis la homojn de ĉia, eĉ la plej serioza malsano, tiele, iom-post-iome, li ricevis dian grandecon, la homoj konstruis honore al li templojn, ili faris sanktoferojn, ili adoradis lin. Tiel, Asklepio estis la unua kaj sola mortemulo kiun diigis la homoj mem, ne la dioj.

Tamen, la kapableco de Asklepio ne havis limojn; post nelonge li provis revivigi mortulojn! Multaj diaĵoj konsilis lin ne fari tion, sed Asklepio ne povis reteni sian ambicion; li daŭrigis siajn klopodojn kaj iun tagon, li ja sukcesis efektiviĝi la neeblaĵon, li revivigis mortinton!

Tio, tamen, estis afero gravega, kiu povus renversi la ordon de la universo kaj ŝanceli la normalan strukturon de la mondo. La reĝo de la dioj, Zeŭso (Ζεϋς), ne povus pardoni tian agon de mortemulo, do, li nur levis la manon kaj Asklepio falis fulmobatita, forbruligita!

La subita pereco de Asklepio ekŝokis Apolonon, kiu povis nek kompreni, nek akcepti la tian finon de sia plej amata filo. Ankoraŭfoje, lian doloron kaj malĝojegon sekvis senbrida kolero; lia eksplodema karaktero puŝis lin al reago tute ekstrema, li atakis kaj mortigis la tri gigantajn ciklopojn, kiuj gardis kaj zorgis pri la fulmoj de Zeŭso!

Tio, kompreneble, estis bato kontraŭ Zeŭso, kiu ne povis esti tolerata de la mastro de la mondo. Sen dua penso, la reĝo de la dioj tuj decidis defaligi sian impertinentan filon en la abismon de Tartaro (Τάρταρα). La ceteraj dioj hororinte aŭdis la teruran decidon kaj nur Letoa (Λητώ), la patrino de Apolono, aŭdacis aliri al la indigninta direĝo, ŝi terĵetiĝis, korŝire lamentante li petegadis lin ne pereigi ilian filon. Ŝi memorigadis al la



granda mastro kiom multe kaj kiom longe ŝi suferegis por naski al li lian plej brilan, plej majestan kaj glortantan filon.

La lamentado de la neforgesebla lia amantino iom moderigis la koleron de Zeŭso, kiu faris duan penson kaj cedis, trudinte tamen eksterordinaran punon, eĉ tre severan. Apolono devis foriri de Olimpo (Όλυμπος), de ĉiuj siaj sanktejoj kaj vivi inter la homoj, kiel ordinara homo, eĉ kiel servisto, dum naŭ plenaj homaj jaroj!

Tiele, Apolono iĝis homo kaj servisto de Admeto, la juna reĝo de Feroj (Φεραί), en Tesalio (Θεσσαλία).

Apolono estis bonsorta, ĉar tiu Admeto estis viro eksterordinare bona, afabla, bonkora, tiom, ke ĉiuj homoj, kiuj vivis apud li, estis ne liaj subuloj, ne subalternuloj, ne servistoj, sed liaj kamaradoj kaj amikoj. Tiu potenca kaj tre riĉa, juna reĝo kun la soldatoj estis soldato, kun la laborantoj laboranto kaj kun la servistoj servisto. Tiele ĉiuj homoj amis lin multe!

Tamen, plej multe el ĉio ajn interesis Admeton la amo de belulino, la amo de sia kuzino Alcestisa, la plej juna filino de la reĝo de Iolko (Ιωλκός), Pelio (Πελίαις). Tiu junulino, same bona kaj aminda virino, estis doninta sian koron kaj ĉiujn siajn amrevojn al la nobla Admeto, ŝi amis lin varme.

La juna reĝo ankoraŭ pli varme, arde amis la belan junulinon, sed li estis malfeliĉa!

Li estis malfeliĉa, ĉar li ne povis akiri sian amatinon, ĉar ŝia patro estis persono, se ne tre malbona, certe ekstavaganca, eble freneza. Admeto mult-foje sendis al Iolko sian peton pri la mano de Alcestisa, mult-foje sendis al la stranga reĝo abundon da riĉaj donacoj, krome, multajn respektindajn reprezentantojn, kiuj per la plej varmaj vortoj laŭde priskribis la karakteron kaj ĉiujn ecojn kaj kapablojn de la juna reĝo, kiuj ankaŭ priskribis la prosperon kaj riĉecon de lia lando.

Tute vane, la stranga Pelio ne donis sian konsenton kaj sub la ofta kaj forta premo de multaj personoj, fine li metis tute absurdan kondiĉon, li anoncis al la homoj de Admeto, ke li cedos nur se la fianĉo iros al Iolko per ĉaro tirata de leono kaj sovaĝa kapro!

Admeto perdis ĉiujn siajn esperojn, li falis en profundan malesperon.

Li ricevadis konstante la plenajn je doloro amesaĝojn de Alcestisa, kiu nenion sciis pri la sencece stranga postulo de sia patro, tamen li povis fari nenion. Kiu homo povus ja jugi leonon kaj kapron? Kompreneble neniu!

Ĉiuj liaj proksimuloj kaj iom-post-iome preskaŭ ĉiu popolano atentis, ke Admeto estas tre ofte paŭtanta, eventuale malfeliĉa, tamen la reĝo, dezirante ne malĝojigi siajn amikojn, diris nenion, li suferis silente,



tute sola. Tamen, inter liaj amikoj estis ankaŭ servisto kun apartaj kapabloj. Apolono, kiu amis la bonkoran sian "mastron", premis lin pli multe ol la ceteraj, kaj fine li eksciis ĉion.

Tiele la problemo estis solvita. Apolono konvinkis Admeton lasi lin zorgi pri la problemo, kompreneble tre facile li malsovaĝigis, dresis kaj jugis la du bestiojn, kaj Admeto sin prezentis antaŭ la forte mirigita Pelio, sur ĉaro tiritita de la sovaĝaj bestoj. Fiere li staris antaŭ la duon-freneza reĝo, li postulis kaj prenis kun si sian amatan virinon!

Kiam la nova reĝino, la bela Alcestisa atingis Ferojn, feliĉo plenigis la tutan landon. Ĝenerala, ekstrema ĝojo regis ĉie kaj ne nur en la palaco, sed en ĉiu domo, en ĉiu dometo kaj kabano estis daŭra festo, ĉar la feliĉo de la amata reĝo estis feliĉo ankaŭ por ĉiu popolano.

La celebrado kaj la publika festo de la edziĝo estis majesta, la tuta popolo partoprenis ĝin. La feliĉa novedzo plenumis ĉiujn decajn ceremoniojn kaj sanktoferojn, li faris omaĝon al ĉiuj grandaj dioj, sed, kia peĉo, li forgesis mencii Artemisan (Άρτεμις). Tiale, la nokton, kiam oni malfermis la lukse florornamitan geedzan dormoĉambron, oni trovis ĝin plena je miloj da serpentoj!

Tio estis signo de tre serioza dia malfavoraĵo, kiu neniigis la ĝojon de la bonkoraj novgeedzoj.

Ili ne povus komenci sian komunan vivon sub premo de tia dia malbeno, do la feliĉon sekvis forta malĝojo kaj malespero, kiu etendiĝis en la tuta lando. Feliĉe, Apolono estis ankoraŭ tie, do, ankoraŭfoje intervenis, li sukcesis kvietigi la koleron de sia fiera fratino, do, post nelonge, kun la pardono de la diino revenis la ĝojo kaj ĉio en la feliĉa lando iris glate kaj pace.

Tre frue venis en la mondon la fruktoj de la



granda amo, du infanoj, knabo nomita Eŭdelo (Εὐδελος) kaj knabino nomita Aspazia (Ἀσπασία). Ŝajnas, tamen, ke estas destinite ne daŭri longe la feliĉo de la bonuloj.

Vere, pri la, ordinare malbona, sorto de la bonaj homoj estas tiom da popoldiroj, unu el kiuj venas nun en mian menson kaj diras, ke "bonulo bonon ne havas!".

Estis tiuj Parcoj (Μοίραι), la tri diinoj, kiuj esprimis la nekonkretan ideon de la homa destino kaj difinis la vivdaŭron kaj la sorton de la mortemuloj. Iliaj decidoj kaj agoj povis esti kontroleblaj nur de Zeŭso, kiu tamen neniam uzis tiun sian rajton.

De tiuj diinoj, do, tute hazarde Apolono eksciis, ke al Admeto estas destinite morti tre juna!

Apolono sciis, ke en tiu okazo li ne povas helpi sian amikon, tamen li petis la Parcojn almenaŭ iom prokrasti la fatalon. La ne facile cedantaj al fremda volo, diinoj, faris al la bela dio la komplezon, ne nur kontentigi lian deziron, sed ankaŭ promesi al li, ke ili donacos la vivon al lia amiko, se alia, iu ajn, mortemulo memvole oferos anstataŭe sian propran vivon.

Tio tamen, ne povis esti diskonigita, ĉar, kompreneble, Admeto neniam akceptus ion tian.

Do, tute diskrete, la afero estis disvastigita inter elektitaj personoj, plejparte maljunaj aŭ grave malsanaj, kiuj, krome, devus esti, pro iaj ajn kialoj, dankemaj al la bonfarema Admeto.

Tamen, neniu, nek intima parenco, nek malnova amiko, nek persono ŝuldanta al la reĝo sian vivon kaj la vivon de siaj infanoj, neniu akceptis oferi sian vivon por savi lin.

Dume, la tempo pasadis, kaj iun tagon, tute neatendite, Admeto grave malsaniĝis. Dum multaj tagoj li forte suferis, en febro kaj fortaj doloroj. La preĝoj, la senlima ĉagreno, la varmegaj larmoj de Alcestisa, kiu senĉese restis super la kuseno de sia suferanta amato, ne helpis. Post kelka tempo, la tute senpovaj kuracistoj konsilis la malfeliĉan virinon, zorgi pri la preparado de la sepultaj ceremonioj, ĉar la malsanulo baraktadis jam kontraŭ la tute apuda morto!

Perdinte la sinregadon, pro neeltenebla doloro, Alcestisa, preskaŭ freneza, komencis sencele vagadi, en la kamparo, poste sur la stratoj, plorante, lamentante, veadante, tiele, ke ŝiaj sekvantinoj devis preskaŭ perforte deteni ŝin de memmortigo. Tio daŭrtis unu - du tagojn, sed, en momento de subita rekonsciiĝo, la reĝino senintence subaŭskultis flustrojn de servistinoj, el kiuj ŝi eksciis la atente kaŝitan al ŝi veron, ke savo por Admeto estas, ke ŝi povas revivigi sian tiom amatan edzon.

Ŝi ne perdis tempon, ŝi iris al la sanktejo, ŝi enfermiĝis tie, tute sola, kaj longe, alt-voĉe, varme preĝis al la Parcoj. Per varmaj larmoj petegis la diinojn akcepti kaj preni ŝian vivon kaj lasi vivanta ŝian amatan edzon, sen kiu, ŝi ne povus kaj ne dezirus vivi.

Tie, en la sanktejo, dum siaj varmaj preĝoj, Alcestisa sentis la unuajn signojn de subita malsaniĝo. Ĝis kiam, stumblante ŝi sukcesis atingi sian dormoĉambron, ŝi estis jam debila, tre malforta, febla!

Kiam ŝi vidis, ke ŝia edzo estas jam preskaŭ tute sana, ŝi delasis sin en lian brakumon, ŝi kisis kaj rekisis lin, kaj per mallaŭta, trema voĉo ŝi nur petis de li, promesi, ke neniam li trudos duonpatrinon al iliaj infanoj.

La momenton en kiu la nenion scianta, forte konfuziĝinta Admeto jesis, Alcestisa lastelspiris, ŝi mortis!

En nur kelkaj momentoj, mirakle, Admeto tute resaniĝis, li mem komprenis nenion, li nur sciis, ke lia mondo definitive, porĉiame ruiniĝis, ke lia vivo havas plu nenian signifon kaj valoron por li.

Nur la nokton, post la enterigo de Alcestisa, oni eksplikis al Admeto kio ekzakte okazis, kiel kaj kial la reĝino mortis tiel subite, kiel kaj kial li tiel mirakle resaniĝis. Tio estis la plej forta bato; la malfeliĉa viro tute dispremiĝis; kun la koro disŝirita li ĉesis senti ion ajn, li nur rigardis la infiniton kaj silentis.

Li estis en tia stato, kiam servistoj anoncis al li, ke atingis la landon tre alta kaj kara vizitanto, la tre bona amiko de la reĝo, la granda heroo kaj duondio Heraklo (Ηρακλής). Admeto, rekonsciiĝinte, donis severan ordonon, ke oni diru nenion pri lia malfeliĉo al la alta, amata gasto. Li bonakceptis sian amikon, li oferis al li la kutiman prizorgon, luksan vespermanĝon, kiel kutime li faris ĉion eblan, por kontentigi lin.

Tamen, tiom granda malĝojo ne povas esti kaŝita. La heroo komprenis, ke io tre grava, io tre malagraba batis sian amatan amikon. Kaŝe kaj preme li demandis, li devigis sekvantojn de la reĝo kaj tiele li eksciis la teruran veron!

Li diris nenion al Admeto, sed, la nokton, kiam mallumo kaj silento kovris la landon, Heraklo iris kaj kaŝis sin ĉe la freŝa tombo de Alcestisa. Li atendis tie,

ĝis kiam aperis la Morto, kiu venis por preni kaj irigi al la suba mondo, la animon de la mortintino.

Kiam tio okazis, Heraklo neatendite surprizis, atakis la Morton, violente luktis, kompreneble faligis kaj devigis sian kontraŭulon cedi, liveri al li Alcestisan kaj foriri!

Jes, Heraklo, nur Heraklo povis fari tion, do, Alcestisa estis kondukita al la palaco, al la sekura brakumo de sia amata edzo, kun kiu ŝi vivis longe kaj feliĉe ĝis profunda maljuneco!

En la efektiveco Alcestisa neniam mortis. Ŝi ĉiam vivas en la pensoj de la homoj, dum sennombraj jarcentoj, kiel simbolo de la plej granda, plej virta amo, kiel simbolo de la plej ekstrema sindonemo, sindediĉo, sinofero.

Kompreneble, multaj artistoj estis inspiritaj de tiu unika, plej alta esprimo de amo.

La grandaj antikv-helenaj verkistoj, inter kiuj Friniĥo (Φρύνιχος) kaj Eŭripido (Ευριπίδης) verkis belegajn dramojn. Sekvis multaj aliaj kreintoj, ne nur verkistoj.

Estas multaj grandaj artaĵoj kiuj konstante memorigas al ni Alcestisan, la splendan edzinon, amatinon, la perfektan virinon! Estas la fama opero de la granda germana komponisto Gluck, sed estas ankaŭ porĉiame sur la ĉielo la asteroido Alceste (124), kiu montras la vojon al la amo!

GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio
(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo

-- el retejo OLE

Stanislav Schulhof (1864- 1919)

Stanislav Schulhof apartenas al tiuj sindonemaj

esperantistoj, kiuj sin dediĉis al diskonigo de Esperanto kaj al krea laboro en la lingvo dum la unuaj jardekoj de la lasta jarcento. Li estis ĉeĥo kaj laboris kiel dentisto en la urbo Pardubice [ˈpardubitse], ĉe la rivero Elbe, 104 kilometrojn oriente de Prago, kie li mortis en 1919. Tie li vigle partoprenis la lokan esperantistan vivon kaj propagandis la lingvon per multaj artikoloj. En tiu urbo aperis en 2004 dokumenta verko pri lia vivo, *Vivo kaj verko de D-ro Stanislav Schulhof*, de Jarmila Rýznarová.

Schulhof estis poeto kaj aperigis tri volumetojn da poemoj, kiuj meritas atenton kiel sinceraj esprimoj de lirikismo, grandparte ombrita de melankolio kaj pesimismo. Tiuj poemaroj, kiuj enhavas entute nur 30 poemojn, aperis antaŭ la unua mondmilito, en du sinsekvaj jaroj, 1911 kaj 1912. Verŝajne li post tio ĉesis sin okupi pri originala verkado, sed sin turnis al tradukado de poemoj el la ĉeĥa lingvo. Kolekto de 30 poemoj de 15 ĉeĥaj poetoj aperis nur post lia morto, en antologio nomita *Bohemaj Grenatoj* (1920).

Pri la tri poemaroj de Schulhof: *Per Espero al Despero* (1911), *Kion la Vivo alportis* (1911) kaj *Aŭtunaj floroj* (1912) Kalocsay bele kaj kortuŝe verkis multajn jarojn poste en *Literatura Mondo* (1922): "Plenmano da versoj, granda promeso portita en la fruan tombon ... kara malfeliĉa poeto, kara malsana doktoro, kortuŝite



mi ekkaresas vian memoron." Li konstatas konstantan evoluon kaj pliperfektigon, ekde iuj ritmaj kaj lingvaj stumbloj en la unua volumo ĝis la veraj literaturaj perloj en la lasta. Mauro Nervi (en Arkivo de EVA, 2005) mencias la fluan esprimadon de liaj poemoj laŭ la kutimo de nia frua poezio, sed atentigas pri surprizaj poemoj, "kiuj pruvas lian realismon kaj pesimismon, ankaŭ koncerne Esperanton mem."

Sian poemon *Desperanto* Schulhof komencas per identigo de Esperanto kun la esenca *Espero* mem: *Dolĉe sonas via nova nomo, / ho Espero! nia bela vorto!*, sed finas ĝin per neevitebla pesimismo pri la homo mem, ke eĉ en malproksima futuro "tiam ree homon batos homo, / sed li batos lin en via nomo –/ ankaŭ kun la stelo sur standardo". Post preskaŭ cent jaroj la pesimismo de la poeto ŝajnas daŭre reala pri la homa raso. Estas inde kompari tiun poemon de Schulhof kun la fama poemo *En amara horo* de Kalocsay, kies pesimismo finiĝas per "Ne!", per kiu li rifuzas lasi la esperon pri Esperanto malgraŭ la senideala mondo: "Vi estas la konsolo en nia mond' amara!"

En sia lasta poemaro, *Aŭtunaj floroj* Schulhof jam atingas plenan evoluon maturecon kiel poeto. La titolo estas melankolia, sed ne pesimisma, kio kongruas kun la tono de la poemoj, doloro certe ne forestas, sed ekvilibras kun ia pensa energio, kiu plej klare aperas en la plej fama poemo de Schulhof, *Kanto de l'sklavo*. La temo de tiu poemo estas Esperanto, kiun la poeto rigardas kiel sian absolutan mastron kaj sin mem kiel ĝian sklavon. Tiu mastro estas senindulga, ĝi ligis la poeton per katenoj el kiuj li ne havas ajnan esperon liberiĝi, kvankam li multfoje klopodis eskapi, sed li ne povas, ĉar lia vivo apartenas al la lingvo kaj moro, kiun

ĝi alportas. La poemo havas kvin kvinversajn strofojn. Jen la dua strofo, kiu priskribas la vanajn penojn de la poeto liberiĝi el sia sklaveco:

*Multfoje mi forĵetis mian plumon,
eĉ emblemon vian, stelon kvinradian,
en la koro fajron mi estingi penis,
sed vi senkompate ĉiam min ekprenis
kaj min pluen, pluen trenis, sklavon vian.*

En la lasta strofo, per vortoj ege trafaj, eĉ korŝiraj, la poeto klarigas la esencon de la mastra potenco de Esperanto kaj de tio, kion ĝi prezentas: nova moro de humana, nobla konduto de la homoj:

*Pli kruelan, ol la famaj uzurpantoj
vi alportis al ni en la mondon moron;*

*ili piedbatis homajn liberecojn,
de la landoj ŝiris partojn, limojn, pecojn,
sed vi ŝiras el la brustoj nian koron.*

La poemoj de Schulhof havas ne nur historian valoron en la Esperanta literaturo. Ili konservas forton, kiu ankoraŭ en nia tempo estas strange freŝa kaj kapabla atingi niajn korojn per sia emociiga realismo. Cent jaroj pasis, sed li estas ankoraŭ kun ni.

de **Baldur Ragnarsson**

Juna amiko, n-ro 121, aprilo 2008

Fonto: <http://literaturo.esperanto.net/tekstoj/ragnarsson/schulhof.html>

La Lasta Leciono (2/2) -- de Alphonse Daudet

tradukis Michel Dereyger el Francio

Same estis pri sinjoro Hamel. Tiuj pensoj, ke li foriros, ke mi ne plu vidos lin, forgesigis al mi la punojn kaj la batojn per la liniilo.

Kia kompatinda homo!

Estis honore al tiu lasta kurso, ke li surmetis tiujn dimanĉajn vestaĵojn, kaj tiam mi komprenis, kial tiuj vilaĝaj maljunuloj venis sidiĝi en la fundon de la klasĉambro. Ili ŝajne esprimis tiel sian bedaŭron, ke ili ne pli ofte venis en la lernejon. Iel, tio ankaŭ estis maniero danki nian instruiston pro liaj kvardek jaroj da bonaj servoj, kaj plenumi siajn devojn al la malaperanta patrujo.

Tie mi estis en miaj pripensoj, kiam mi aŭdis, ke oni vokis mian nomon.

Alvenis tiam mia vico por reciti.

Kion mi ne estus doninta por povi komplete rediri tiun regulon pri la participoj, laŭte kaj klare, senerare! Sed mi konfuziĝis jam de la unuaj vortoj, kaj daŭre staris svingiĝante ĉe mia benko, korprome, kaj mi ne aŭdacis levi la kapon.

Mi aŭdis sinjoron Hamel, kiu parolis al mi:

"Mi ne admonos vin, mia eta Franz, ĉar vi jam estas sufiĉe punita... Tiel estas!... Ĉiutage oni diras al si:

"Nu! Mi havas ja tempon! Mi lernos morgaŭ!"... kaj vidu tion, kio okazas!... Ha! Tio estis granda malfeliĉo de nia Alzaco : ĉiam prokrasti sian instruadon je morgaŭ... Nun, tiuj uloj rajtas diri al ni : "Nu, vi pretendis esti francoj kaj vi scipovas nek legi nek skribi vian lingvon!"... Pri ĉio tio, mia povra Franz, ne vi mem plej kulpas; ĉiu el ni havas ja sian parton da memriproĉoj..

"Viaj gepatroj ne sufiĉe zorgis, ke vi instruiĝu. Ili

preferis sendi vin labori en la kampoj aŭ la ŝpinejo por ricevi kelkajn pliajn groŝojn...

"Ĉu mi mem havas nenion riproĉindan?"

"Ĉu mi mem ne ofte petis, ke vi akvumu mian ĝardenon anstataŭ lerni?..."

"Kaj kiam mi deziris iri fiŝkapti trutojn, ĉu mi ĝenis min por lasi vin ferii?..."

Tiam, unu aferon post la alia, sinjoro Hamel komencis paroli pri la franca lingvo, dirante, ke ĝi estas la plej bela lingvo en la mondo, la plej klara, la plej solida; ke necesas ĝin gardi inter ni kaj neniam forgesi. *Ĉar kiam popolo sklaviĝas, tiom longe ĝi bone tenas sian lingvon, tio estas kvazaŭ ĝi havus la ŝlosilon de sia malliberejo... **

Poste, li ekprenis gramatikon kaj voĉlegis nian lecionon. Mirigis min senti, kiom multe mi komprenis. Ĉio, kion li diris, ŝajnis al mi facila, tre facila. Mi ankaŭ opinias, ke oni neniam tiel bone aŭskultis, kaj ke ankaŭ li neniam montriĝis tiel paciencema en siaj klarigoj.

Ŝajnis kvazaŭ la kompatinda viro, antaŭ ol foriri, dezirus donaci al ni sian tutan scipovon kaj enirigi ĝin en niajn kapojn je nur unu fojo.

Fine de la leciono, oni turnis sin al la skribado.

Por tiu tago, sinjoro Hamel jam preparis tute novajn ekzemplojn, skribitajn per belaj rondaj literoj : **France - Alsace - France - Alsace.**

Tio aspektis kiel etaj flagoj flagrante ĉie ĉirkaŭ la klasĉambro, alkroĉitaj al la stangetoj de niaj pupitroj.

Impresis vidi kiel ĉiu koncentriĝis, kaj en kia silento!

Aŭdiĝis nur la grincado de la plumoj sur la papero.

Unu momenton eniris majskaraboj, sed ĉiuj



preteratentis ilin, eĉ la plej etaj, kiuj koncentriĝis por desegni siajn strekojn, kore, konscience, kvazaŭ ĉio tio estus la franca lingvo.

Sur la tegmento de la lernejo, kolomboj mallaŭte kveris, kaj aŭskultante ilin, mi diris al mi : "Ĉu ankaŭ tiujn oni devigos kanti en la germana?"

De tempo al tempo, kiam mi levis la okulojn super miajn paĝojn, mi vidis sinjoron Hamel, kiu, senmova en sia katedro, fikse rigardis la aĵojn ĉirkaŭ li, kvazaŭ li volus kunpreni en la rigardo sian tutan lernejan dometon.

Imagu! de kvardek jaroj li troviĝis tie en la sama loko, kun la korto kaj la klasĉambro ĉiam similaj antaŭ li.

Tamen la benkoj kaj la pupitroj poluriĝis, frotitaj pro la uzado; la juglandarboj de la korto kreskiĝis, kaj la lupolo, kiun li mem iam plantis, ornamis per girlandoj la fenestrojn ĝis la tegmento.

Kia korpomateco tio certe estis por tiu kompatindulo : forlasi ĉiujn tiujn aĵojn kaj aŭdi sian fratinton iri kaj reveni en la supra ĉambro, fermantan la kofrojn, ĉar ili devis foriri la morgaŭon kaj forlasi sian landon por ĉiam!...

Tamen li kuraĝis daŭrigi sian kurson ĝisfine.

Post la skribado, mi havis mian lecionon pri historio.

Poste, la etuloj ĉiuj kune kantis : BA BE BI BO BU.

Tie for, en la fundo de la klasĉambro, la maljunulo Hauser surmetis siajn okulvitrojn kaj, tenante ambaŭmane sian abocon, li literumis la literojn

samtempe kun ili.

Videblis, ke ankaŭ li koncentriĝis; lia voĉo tremetis pro la emocio; kaj estis tiel amuze aŭdi lin, ke ni ĉiuj emis ridi kaj plori.

Ha! mi memoros tiun lastan lecionon!

Subite, la horloĝo de la preĝejo sonis la tagmezoon kaj la anĝeluson.

Samtempe la trumpetoj de la prusoj, kiuj revenis de l'ekzercado, sonigis sub niaj fenestroj. ...

Tute pala, sinjoro Hamel stariĝis en sia katedro.

Neniam li ŝajnis al mi tiom altstatura.

"Miaj amikoj..." li diris, "miaj amikoj, mi... mi..."

Sed io sufokigis lin. Li ne sukcesis fini sian frazon.

Tiam li returne turnis sin al la skribtablo, ekprenis pecon da kreto kaj, premante per siaj tutaj fortoj, li skribis tiom larĝe, kiel li povis : **VIVE LA FRANCE!**

Poste, li restis tie, kun la kapo apogita kontraŭ la muro, kaj, sen paroli, li mansignis al ni :

"Tio estas finita... Foriru..."

* « *S'il tient sa langue, il tient la clé qui de ses chaînes le délivre.* » citaĵo de Frédéric Mistral (franca verkisto, kiu skribis en la provenca lingvo).

FINO

tradukis **Michel Dereyger** el Francio

el la literaturaj paĝoj de Monda Asembleo Socia (MAS)

tradukis **Vilhelmo Lutermano el Kubo**

Boto Ŝtraŭso 1: Pri amo

Historioj kaj maloj

Unuopuloj kaj fremduloj

Korpokomerco

Knabino en blanka linpantalono larĝa kaj pufa ĉe la kruroj, sed streta kaj travidebla kokse, tiel ke la elstarantaj randoj de la kalsoneto kaj la ombro de la sekso apartenas certe al la dezajno, suprenvenas la kelŝtuparon anhele kun saltkordo en la mano, post la gimnastiko⁸ la dekan vespere. Nenia rigardo, nenia saluto, nenia hezito, nur tiu ŝvita spiro de ekzercitaj korpomembroj, nur la urĝa supreniro de same intriganta kiel tolerema, tiom afereca kiom indiferenta, tiel netuŝebla kiel uzintensa narcismo; tiu trejnilo provizita per karneca ornamaĵo, tiu korpiginta

malintereso, tiu reriĉiga instalaĵo⁹ de sterila gracio, tiu markartiklo el nia jarcento de dorlotado, tiu ŝika, ĉiea tipo de sportaj indiferentuloj - ĉu tio estas la virino, kiun ni laŭdire volas malaltigi al objekto de niaj voluptoj?



Ja, se sekso povus mortigi! Se ĝi povus almenaŭ konfuzi, aĉigi, misformi, fari neuzebla tion, kio estas tiel mizere adaptita kaj moraligita en la vakuon, kaj se ĝi kapablus kurigi la trejnitan koron kaj krevigi ĝin ... Sed ĉu ne ĉia korpokomerco neeviteble restus ago de memfortigo de ĝuste tiu modelo, kiun oni volis mortigi?

Fabeloj pri viro kaj virino

Viroj kaj virinoj

Kiam ŝi kuŝas enlite kaj rigardas min kun larĝaj okuloj, mi provas, sen ke ŝi petis tion, rakonti historion

por endormigi ŝin kaj trankviligi min.

Kion do vi volas aŭdi, vi sekse informitino? Veran historion mi rakontu al vi, antaŭ ol via klera kapo glitos en la kusenon. Ĉu vi volas aŭdi: 'Viroj kaj virinoj' aŭ 'Litero mankas en la aboco'? 'Litero mankas en la aboco' rakontas pri tio, kiel la 27-a litero estis ŝtelita kaj kiel estiĝis la blanko inter la vortoj kaj kiel la tuta lingvo estis denove konstruota, kiam oni fine retrovis la 27-an literon. Do, prefere 'viroj kaj virinoj'. Bone.

Origine ambaŭ seksoj ne estis destinitaj unu por la alia. Viroj kaj virinoj vivis kiel pacaj triboj en bona najbareco kaj interŝanĝis siajn varojn. Ĉar ĉiu sekso posedis belegajn kaj utilajn havaĵojn, kiujn la alia malhavis. Tiel la virinoj ekzemple posedis la paŝtejojn, la kinejon kaj la buterpanojn, dum la viroj liveris kloridan acidon, diamantojn kaj farunon. Amo kaj malamo inter la homoj ankoraŭ ne ekzistis. Ĉiu pleje amis tion, kion li produktis kaj disponigis por la interŝanĝo. Ĉiuj amis nur siajn aĵojn. Tiutempe ankaŭ la morto estis ankoraŭ bona amiko de la homoj kaj ĝi estis fertila. Naskiĝo kaj morto estis unu, kaj la morto donis la vivon. Ĉiufoje, kiam viro estis mortanta, elrampis knabo el lia ventro, kaj ĉiufoje, kiam virino estis mortanta, elrampis knabino. Tiu vivo, en kiu ekzistis nur la diferenco inter laboro kaj nenifarado kaj la diferenco inter viro kaj virino ne estis pli grava ol tiu inter du aliaj ordinaraj aĵoj, ekzemple ŝtono kaj herbo aŭ saltetado kaj mansignado aŭ tuko kaj salo, tiu vivo, kiu estis nek feliĉa nek malfeliĉa, daŭris senmezuran tempon. Sed iun tagon Mara, la princino kaj gvidanto de la laboristinoj, estis mortanta kaj naskis principinon. Sed Mara restis nur unu tagon ĉe la mortintoj kaj revenis sekvatage kaj plu laboris ĉe siaj aĵoj, pri kio ĉiuj ektimis, sed ŝi estis tre interŝanĝavida virino.

Tio kolerigis la spiriton de la morto kaj li de tiam rifuzis al la mortantaj virinoj la fertilecon. Neniu knabino enmondiĝis plu. En granda maltrankvilo la virinoj preparis unu luksan oferfeston post la alia por la naskomorto-dio, sed tute vane. Ili tiom elspezis sin ĉe tio, ke ili malriĉiĝis pli kaj pli kaj enŝuldiĝis ĉe la viroj, kiuj siavice nun pli kaj pli riĉiĝis. Tiel venis la malegaleco inter la seksojn kaj la duono de la kreaĵo ŝajnis minacata de formortado.

Tiam la dio de la naskomorto vidis, ke li ne rajtas pli longe paŭzi kaj li prenis sian ardezan tabulon, sur kiu li faris siajn planojn kaj sian logikon pri la homoj, kaj kalkulis febroŝvite por kompensi la eraron. Sed ne prosperis al li retrovi la malnovan ekvacion de la seksoj.

Malespere pri si mem, li ĵetegis la tabulon malsupren sur la teron, rezignis la tutan ekzercon kaj turnis sin aliloken. Tiel la homoj ricevis la disrompitan ardeztabulon, la konfuzitan dian materion, kaj ne sciis kiel okazis al ili: ĉio konfuziĝis. La viroj mortis en sia plej forta aĝo kaj postlasis du nuksojn. La virinoj formanĝis avide ĉion kion ili estis produktintaj por la interŝanĝo kaj por sia vivtenado. Jen ĉiuj vagadis sencele. Sed iun tagon subite kelkaj viroj kaj virinoj salutis sin reciproke, kaj en plej granda timo perej ili ĉirkaŭprenis sin reciproke. Poste la virinoj vidis, ke ili fariĝis fertilaj de la viroj kaj povis naski sen samtempe morti. Sed la viroj perdis por ĉiam la kapablon naski, kaj ili bezonis la virinojn, kiuj nun povis enmondigi knabinojn kaj knabojn, sed nur se la viroj firme ĉirkaŭprenis ilin. Tiel el la forĵetitaj leĝoj kaj la rompopecoj de dia saĝeco estiĝis inter la seksoj la malegala interŝanĝo de semo kaj infanoj kaj estiĝis la amo kiel fratino de la senforma teruro, kiun la melankolia dio, ne retrovinte sian ekvacion, venigis sur la homaron: Sed la virinoj estis honestaj kaj amis kaj disdonis la infanojn juste, la knabojn al la viroj, al si mem la knabinojn. Sed la viroj, jam fariĝintaj havemaj, trompis la virinojn, kiuj nun devis plurfoje naski dum sia vivo kaj ne plu povis sufiĉe okupiĝi pri siaj havaĵoj. Pro tio ĝis hodiaŭ la virinoj ne forgesas, kiel ili fartis, antaŭ la amo, kiam ili ankoraŭ posedis la duonon de la aĵoj.

¹ *Botho STRAUSS (naskiĝis la 2-an de decembro, 1944 en Naumburg) estas germana aŭtoro de rakontoj, romanoj, dramoj, eseoj kaj filmscenaroj.*

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/Strauss2.html>

17>>

lin mire, kvazaŭ li estis subite freneziĝinta.

- Kiel de Lia Amando, do, tio estas de Mercedes

Vera ridis tutanime kaj kaptis lian manon je signo de plezuro kaj amo.

rakonto de **Bajram Karaballi**

tradukis kaj sendis **Bardhyl Selimi** el Albanio

(daŭrigota)

En la antikvo iu Grandsinjoro
 Transmigris en subita horo
 Al vasta regno de Pluton'.
 Pli simple — mortis la person'.
 En la infer' al juĝo li alvenas.
 "Jen kiu vi? De kia lok' devenas?"
 "Mi estas el Persuj', satrapo — mia rang',
 Sed dum la viv' je sano estis mank',
 En regiono mi ne regis,
 Sekretario ĉion flegis."
 "Sed kion faris vi? " —
 "Mi dormis, sate manĝis,
 Subskribis kion li aranĝis".
 "Al paradizo tuj!" — "Sed kie estas justo?"
 Ekkriis sen ĝentil' Merkur' per tuta brusto.

"Ho, frat'!" respondis nun Eak':
 "Vi estas sen kompren' pri ordinara ag'.
 Stultulo estis li! Kaj se en sia fak'
 Li regus kun potenco,
 Malbona estus konsekvenco, —
 La tuta region' disfalus je ruin',
 Netolerebla estus vivo...!
 Al paradiz' ni sendu lin
 Pro lia senaktivo."
 Hierau vidis mi juĝiston dum juĝad' —
 Nu, certe trafos li al regno de beat'.

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
 tradukis Sergej Grigorjeviĉ Rublov (1901-1979)
 Ukrainio

Poemo de Odilon

tradukis kaj sendis Roland Platteau el Francio

Nu, post reklami originalan poeton Angel, mi iom parolos ankaŭ pri mi! Nur libro el tradukoj, poemoj el la tuta mondo, Tagore, Saint-John Perso aŭ Prévert, kiujn mi esperatigis kaj estis publikigitaj de Monda Asembleo Socia

<https://www.amazon.com/lumoj-ekmiroj-Travagado-poezia%C4%B5oj-MAS-libro/dp/2369601973>

(kompreneble havebla ĉe UEA aŭ eĉ pli simple rekte de la eldonisto).

Kaj mi ankaŭ ĉi tie metos poemon, kiun vi ne trovos en ĝi, ĉar ĝin mi esperatigis en majo 2021.

Ĝi estas de belga poeto, kiu vivis de 1901 ĝis 1928, Odilon-Jean Perrier. Ĝi (la franclingvan originalon !) mi pasinte multe recitis: ĝi elvokis min pri mia persona karulino....

*Gajno nia sekreta plurestos,
 Kaj ni kune trinku iom da vin'.
 Ci knabino pli milda ol besto,
 Kiu estas masko de la destin'.
 Cia ridet' ŝirita jen miro,
 Sed la diojn miajn ne konas ci,
 Dum sobredelira mi sen diro,
 Ilin svage kunbrakumas en ci.*

Odilon-Jean Perrier





Antaŭparolo

Tutmonde ekzistas verŝajne pli ol 60 milionoj da libroj de la aŭtoro Erich von Däniken. Nekredeble, ĉiufoje kiam mi parolas pri tiu sukcesplena verkisto, mia kunparolanto nur afable ridetis al mi. Lia vizajesprimio malkaŝas, ke oni taksas tiun literaturon maksimume amuza, sed neniam serioza.

„Ĉi tio estas nur fantaziaĵo!“, mi aŭdas, se mi klarigas kiel Erich von Däniken skribas, ke estis la eskterteruloj, kiuj venis antaŭ pluraj jarmiloj al ni kaj influis nian evoluon.

En mia lernejo mi lernis, ke ĉi tie sur la tero unue aperis la plantoj kaj bestoj, poste la homoj, rezulte de la evoluo. Tio estas ja mistero por si mem.

Do, ĉu vere Däniken pravas? Estinte lernanto oni ja ne povis ĝuste prijuĝi tion. Sed eĉ kiel plenkreskulo oni havas malfacilaĵojn kun tiaj ideoj. Ĉiuokaze dum tiu tempo avidege legis tiajn librojn. Estis facine. La dioj simple estis eksterteruloj. Ili zorgis ke ni homoj aperis sur nia planedo.

Sed jam tiutempe mi neniam estis kontenta pri tiaj ideoj. Baldaŭ mi demandis min, de kie venis tiuj tiel nomataj 'dioj', kaj kiu kreis ilin. Por tiuj demandoj Däniken ne ofertis respondojn. Tamen, liaj libroj estas ĉiam ankoraŭ tre interesaj.

Krom tiaj libroj, hodiaŭ ankaŭ la interreto ofertas tiajn temojn. Ĉi tie oni trovas sufiĉan materialon pri ĉiu ajn misteroj. Ili traktas ne nur la misteraj rakontoj pri eksterteruloj, kiuj laŭdire jam estis ĉi tie...

Unufoje semajne kvar maljunaj viroj renkontiĝas en publika domo. Ĉi tie ili ĝuas bongustan matenmanĝon kaj babilas en agrabla ĉirkaŭaĵo.

Diversaj temoj estas diskutataj, temoj el la ĉiutaga vivo. Multe pli interesa fariĝas la kunvenoj kiam ĉiuj el la grupo komencas prepari specialan temon por

prezenti ĝin al la aliaj. Dum tio la grupo penetris en regionojn, kiujn ili neniam antaŭe tuŝis.



Matenmanĝo

Merkredo en la publika renkontejo. Tridek minutojn antaŭ la deka.

„Bonan matenon, juna sinjorino! Tri kafojn kun bulkoj, mi petas“, anoncas Jens al la virino, kiu staras malantaŭ la vendotablo. Por ornamo la bulkojn, plej ofte la maljunuloj elektas kirlovaĵon, fromaĝon aŭ tranĉaĵon el rostita viando. La rostita viando estas la plej ŝatata manĝaĵo de Rudi. Ĉiufoje aŭdante tiun specialan deziron Jens kaj Karl ne povas subpremi ridetojn. Ne longe dauras kaj ĉiuj tri sidas apud la tablo komencante la matenmanĝon. Ne ekzistas plano por la malgranda rondo. Tuj ĉiu ekraportas pri la okazaĵoj de la venonta semajno.

„Mi vere ĉagreniĝis. Mi tute ne komprenas, kial la homoj simple forĵetas la cigaredstumpojn sur la trotuaron?“ aŭ „Jam denove mia apotekisto provis oferti al mi pilolojn de iu farmacia konzerno, kiun mi tute ne konas. Mi ja plurfoje postulis, ke mi nur akceptu la medikamentojn de mia favorata firmao.“, aŭ „Ĉu ne estas terura afero? La estroj de la grandaj entreprenoj ricevas nekredeble grandajn mondonacojn!“, kaj „La lasta elektra fakturo denove estis pli alta ol atendite!“

Kromaj similaj plendoj sekvis. La bulkoj kaj la kafo bongustas. Tamen, pro la diskutitaj temoj ne aperas bona humoro.

„Ĉesigu la plendadon“, opinias Rudi kaj proponas iomete prepari la venontan kunvenon. Kvazaŭ kiel hejmtasko ĉiu serĉu interesan temon en la interreto aŭ en gazetoj, kiu bone taŭgus por la venonta babila rondo.

Rudi aldonis: „Uzu simple la ŝlosilvorton 'mistero'. Aŭ prenu du vortojn, ekzemple 'misteroj scienco' aŭ 'misteroj historio' k.t.p. Ĉe YouTube vi certe trovos ion!“

(daŭrigota)

verkis **Klaus Friese** el Germanio
(plumnomo Erik Tantal)

fonto: <http://esperanto-klaus.de/>

Pluvo

verkis kaj sendis Ivaniĉka Maĝarova el Bulgario

Pluvo
frapas sur la fenestro
La infaneto
dormas kun rido
sur sia vizaĝo.
Sonĝas ĝi
la kison de la patrino
Ŝi
laboras duan brigadon
kaj baldaŭ venos!
La patro
estas ie en la mondo
laborante pro la pano.
Pluvo
frapas sur la fenestro.
Mateniĝas.

La mateno
estas kovrita per
la purpurkoloro de la Dioj!
Sed en la ĉambro
daŭras la silento!
Pluvo
frapas sur la fenestro.
La tago
komencas denove.
La floroj velkas
soifaj por konsolo.
En la ĉambro
estas silento!
La vortoj mortas!
Pluvo
frapas sur la fenestro.

La pordoj grincas
forlasitaj sen amo.
La tago
mortas kruela kaj
Indiferenta.
La doloro restas!
Pluvo
frapas sur la fenestro!



verkis kaj sendis
Ivaniĉka Maĝarova
el Razgrad, Bulgario

Poezio - Maja

-- konkursaĵoj de EKRA 2021 - Razgrad

Hajkoj

Vento en betul`.
Susuras foliaro.
Ĝojas birdaro!.

Multkolora val`.
Agrablas la florbedoj!
Abeloj zumas!

Brilanta luno
En la plena lum` inter
dancanta stelar`.

poemoj de
Jadranka Miric
el Serbio

Oriente sun`
dentohava. Frostiĝas
tremanta herbej`.

Super altaĵo
Suno lante kaj ore
Jen, sunsubiras.

Nigra profunda
Nokto. En la aŭro
krepusko, jen sun`.

Tria premio en poezio

Ŝanĝiĝas veter`.
Iom post iom suno
venkonte brilos!

Pala luneto
aperonta malantaŭ
griza nubaro!.

Verdiĝas altaĵ`
Samkiel brue kanto
eĥas tra monto!

verkis **Maja**

Eŭropa Trajno

NIA FERVOJISTA-ESPERANTO GRUPO RENKONTIS LA 'EŬROPA TRAJNO'N

La jaro 2021, estis anoncita de Eŭropa Komisiono en Bruselo, kiel jaro de fervoj-transporto. Tio signifas, ke homoj devas preferi veturi per trajnoj.

La 2-an de septembro ekde Portugalio ekveturis Kunuigita Ekspres trajno, kiu trapasus ĉiujn membro-landojn de Eŭropa Unio.

Ses belegaj vagonoj ornamitaj kun vidindaĵoj de diversaj ĉefurboj impresas la homojn, kiuj ŝatas trajnoj. La Eŭropa Ekspres trajno alvenis en Bulgario el najbara lando Grekio. La 16-an de septembro la trajno alvenis ĉe ni, ĉe stacidomo Gorna Orĥovica, situita en norda Bulgario. Kompreneble la fervojisto-esperantistoj atendis kun humoro la belegan trajnon.


verkis kaj sendis Angel Maglov el Bulgario


Ok minuta paŭzo estis mallonga tempo,
sed ni sukcesis fari fotojn.

Partoprenis la prezidantino Petja Aleksandrova, Angel Maglov, Elena Romanova, Stefka Stefanova kaj aliaj.

Poste la trajno daŭrigis al Rumanio. Fin-fine la Ekspres Eŭropa trajno atingis Parizon laŭ la plano la 7-an de oktobro.

La trajno trapasis 20,000 kilometrojn tra Eurora Unio.





Bayram Karaboli

En nia ambasadejo en Varsovio alvenis pola civitanino. Komence, mi ne komprenis kial nia ŝoforo, tre laborema polo, kiu faris ankaŭ la taskon de gardisto, ankaŭ tiun de ĝardenisto, petis tion al mi, dum ŝin povus akcepti aliulo. Sed momentemi rememoris ke tiun tagon estis neniu el sekretarioj. Sekve mi devus akcepti ŝin. Certe la polino petus turisman vizon. Tiel diris al mi la ŝoforo, kiam mi demandis pri la kialo prezentita de lia kuncivitanino.

Mi malsupreniris en la salonon. Sinjorino je gaja kaj bela vizaĝo, ekstaris el la fotelo, kie ŝi atendis min kaj etendis sian manon salutante min albane. Tio vere surprizigis min, sed momente ekpensis ke eble ŝi estas lerninte nur kelkajn salutvortojn, kiel faras multaj homoj en tiaj kazoj, por respekti la akceptonton, aŭ por krei varman etoson por la rendevuo.

La polino estis blondulino kun okuloj samkoloraj al la ĉielo. Sed la bluo de ŝiaj okuloj havis ion apartan. Kvazaŭ kelkiu estis skribinta sur tiuj okuloj iun mesaĝon je bela griza koloro. Ŝi havis sveltan staturon kaj aspektis malpli ol kvindekjara. Mi mem apenaŭ eklernis la polan kaj malfacile klopodis peti ŝin en kiu lingvo ni interbabilus.

- Albane ni parolos- milde respondis ŝi ridetante sincerplene.

Tio mirigis min sed samtempe ege ĝojigis.

- Ĉu vi estas polino?- petis min por certiĝi.

- Jes- diris ŝi, ne forviŝante la rideton el la norda blanka vizaĝo.

- Mi scivolemas aŭdi en kiuj cirkonstancoj vi estas lerninta mian lingvon- aldonis mi.

- Mi estis ja "nuse" (junedzino) en Albanio- respondis ŝi dum ŝia rideto estis estingiĝinte kvazaŭ io forprenis tion perforte.

Mi riproĉis sin ke ne cerbumis antaŭe pri tio, sciante ke dum la epoko de florado de la socialisma

tendaro, granda parto de la albanaj junuloj finstudintaj en la eksaj "frataj" komunismaj demokratioj, revenis hejmen edziĝintaj kun lokaj junulinoj, kiuj envere enamiĝis al ili. Eble trompis min ŝia vizaĝo kiu ŝajnis ne aparteninta al tiu tempo. La perdo de la rideto, tiel neatendite, iel maltrankviligis min, sed la uzado de la albana termino, tiom albana "nuse", iel varmigis kaj kuraĝigis min por daŭrigi pli libere la konversacion.

- Kaj nun vi loĝas ĉi tie?- petis mi duondubeme, sciinte ke la plimulto de tiuj geedziĝoj estis fininiĝintaj malbone aŭ tragike post kiam nia lando malamikiĝis kun la eksaj komunismaj membroj de socialisma tendaro kaj memizoliĝis. Tamen plurestis raraj geparoj savitaj al de tiu pesto kaj nun povus vivi ie ajn laŭvole.

- Mi rakontos- diris ŝi- Sed unue mi petus vin turisman vizon por mia filino, kiu estas ja la celo de mia vizito.

- Certe mi donos ĝin al vi- diris mi kaj demandis:- Mi petas, krom la kafo, kiel en la albanaj hejmoj, kion vi pludezirus?

- Kion ajn- diris ŝi, same kiel tion kutimas diri la albanaj gastoj.

Mi mendis kafon kaj trinkaĵojn. Poste mi elpoŝigis la cigaredojn kaj ofertis al ŝi unu. Ŝi prenis kaj diris ke ekfumus kiam alvenos la kafo. La kafo alvenis kaj mi ekbruligis la cigaredon al ŝi kaj por si. Ŝi enspiris la fumon iel soife kaj ekrakontis sian historion kiel jene.

Vera, tiun posttagmezonekiris al la Publika Biblioteko troviĝanta en Palaco de Kulturo kaj Scienco en la placo Defilad. Tiu palaco estas plej granda kultura komplekso de la lando, donacite de Sovetia Rusio. Estis envere plezuro pasigi la liberan tempon tie.

La komenciĝo de majo en Varsovio estas kvazaŭ la sama de aprilo por iu mediteraneo. Do tio estas prokrastita printempo. Tamen la varmo komenciĝis kaj la homoj sin vestis malpeze, precipe la junuloj. Vera, tiun posttagmezon, estis vestinte blankan robon kun ruĝaj rozoj kaj malpezaj sandaloj ruĝaj. La maldikan zonon premis iomete larĝa strio, ankaŭ tiu ruĝa, el fajna ŝelo. Ŝi studis en la lasta jaro de la mezlernejo. Venontan semajnon, ŝi devus prelegi pri "La floroj de la pomo" de John Galsworthy. Traleginte unuspire la novelon kaj plorinte pro la sorto de Migena, ŝi bezonis aldonan materialon pri tiu skuiga dramo. Ŝi trovis tekston kun komentoj pri la okcidenta beletro kie oni parolis ankaŭ pri Goldswarth. Eksidis en libera loko kaj trafolumis la libron interese. Post iome, kelkiu eksidis ĉe ŝia maldekstra brako. Droninte en la legado, ŝi ne



dediĉis intereson al la najbaro. Sed li mem, post duonhoro, eklevi la kapon el sia libro kaj turnis ĝin proksimiĝante al la knabino. Vera aŭdis ke kelkiu parolis al ŝi, preskaŭ murmurante (tio estis antaŭpostulo en publikaj bibliotekoj) per fremda pollingvo sed agrabla elparolo kaj diris:

- Pardonu min, mi petas. Mi stumblis ĉe iu esprimaĵo. Ĉu vi povas helpi min?

Vera kunfrapigis sian longajn okulharojn pro surprizeco kaj tuje kapturiniĝis al la direkto de la voĉo.

Pro proksimeco de la alies vizaĝo ŝiaj lipoj kvazaŭ tuŝis ĝin. Tio sentigis ŝin pli varma kaj la blanka membrano de ŝiaj facoj koloriĝis al purpuro. Tio kion ŝi ekvidis momente estis la bruna vizaĝo de la junulo kun nigraj okuloj kaj brovoj, rareco por sia blonda raso. Dume ŝi konsciiĝis, ridetis sincere kaj ekrigardis per belaj okuloj la libropaĝon, ĉe la loko kie la junulo fingromontris. Legis la frazon, turnis sian rigardon baraktantan al li kaj eksplikis. La junulo tutan tempon gapante al ŝi, dankis kaj denove pardonpetis. Ŝi diris ke tute ne estis ĝenata kaj pretis denove helpi lin, se bezonote. Poste ŝi turniĝis al sia libro, sed ne plu kapabla koncentriĝi. Certe li estas fremdulo. De kie li estu? Kion li studas? Kaj pliaj aliaj demandoj naskiĝis ĉe ŝi. Sed ankaŭ la junulo ne plu estis trankvila. Tion oni povus konstati pro vanaj kaj nervozaj movoj liaj sur la libropaĝoj. Vera bruliĝis pro arda deziro, ke la fremda junulo denove petu ŝin. Kaj li petis ree, sed ne por vortoj kaj esprimoj nekonataj.

- Mi estas legante ion pri arkitekturo. Kaj vi?

Ŝi respondis pri kio ŝi estis legante. Ĉiam la paroloj estis mallaŭtaj kaj kun vizaĝoj proksimiĝintaj.

- Kiel vin nomas?- demandis li.

- Veronika- jam la ruĝo ne plu aperis en ŝia vizaĝo, dum la rideto pluestis.

- En mia lando tiu ĉi nomo diratas kurte Vera kaj signifas la duan sezonon de la jaro, do en la pola "lato"- diris li malpeze ridante.

- Tio plaĉas al mi. De kie vi estas?- demandis unuafoje ŝi, ĉar la kuraĝeco de la junulo estis transdonita ankaŭ al ŝi.

- Mi venas el Albanio kaj mia nomo estas Fatmir, aŭ kurte Miri. Mi studas en la antaŭlasta jaro de fakultato pri arkitekturo. Sed..- li ion volis pludiri, kiam iu aĝulino petis ilin por silento. Ambaŭ gejunuloj pardonpetis, sed nevole, estis pretaj eksplodi pro junece gajo, malfacile tenata. Devigite kaj pro silenta interkonsento ili ekstaris samtempe. Ŝi antaŭe, li post ŝi, ili iris por revenigi la librojn. Malsupreniris la ŝtuparon ne ĉesigante la ridon. Ŝajnis ke ili konis unu la alian delonge kaj ridadis pro feliĉeco. Eliris eksteren. La punkto estis freŝa kaj la urbo svarmis.

- Kie ni lasis?- demandis Fatmir.

- Kion?- petis Vera kaj denove ne eltenis la ridon

- La konversacion- diris li

Ŝi ŝultrogestis "mi ne scias" kaj metis la manplaton ĉe la lipoj kvazaŭ haltigu la necesantan gajecon.

- Oh, jes. Unue mi deziras ke ni parolu per "ci". Ĝenas ja tiu etiketo. Ĉu vi konsentas?

- Jes ,mi konsentas.

- En kiu jaro ci studas, Vera?

- En la lasta jaro de gimnazio.

- Kion vi scias pri Albanio?

- Mi scias ke ĝi estas malgranda mediteranea lando kaj..Ĉu bela?- subite pludemandis ŝi.

- Jes , tre bela- respondis Fatmir kaj tuj demandis- Kie estas via hejmo?

- En la kvartalo Zoliborz. N efore de ĉi tie.

- Ĉu mi akompanu cin?

- Jes, ja.

- Ĉar ĝi estas proksime, ĉu ni piediru?

- Bone. Ni piediru- akceptis Vera tutvole.

Vera ne povis kompreni kial ŝi sentis sin tiel sekura kun tiu nekonato. Ili eliris en la straton Marŝalovska kaj ekiris. Dumvoje ŝi longe parolis. Faris multajn demandojn pri Albanio. Respondante, Fatmir, deziris ke la vojo neniam finiĝu. Sed diable, ili finfine alvenis en la strato Adam Mickieviĉ, sur kiu troviĝis la ties domo. Ili haltis. Malfacilaj silentaj momentoj.

Ĉu ni renkontiĝu morgaŭ?- pli ol demando tio estis peto far Fatmir.

- Bone- respondis per interna ĝojo ŝi.

- Do, samloke, samhore. Ĉu bone?

- Bone- respondis ridetante Vera.

Fatmir manpremis al ŝi kaj diris bonan nokton. Ne kisis ŝin. Disiĝis. Li atendis ĝis ŝi eniris kaj poste ekiris.

Morgaŭon, ambaŭ ili iris antaŭtempe al la loko. Sidis tie iel embarasite, nur unu horon. Ili ne povis studi pli. Tiel ankaŭ la postan tagon. La trian tagon ili ne iris al la palaco. Difinis rendevuon en Centrum. Ĉe kafejo "Internacional".

Ili renkontiĝis ĝoje, kvazaŭ estis pasintaj multaj tagoj nevidante unu la alian.. Eniris en la kafejo kaj eksidis. Parolis pri la beletro, pri modo, pri filmoj kaj pri unu la alian. La glaciaĵoj degelis apenaŭ manĝitajn. Fatmir gapis al la ŝia vizaĝo kaj dum Vera rakontis, li haste interrompis ŝin:

- Atendu. Ĉu ci jam spektis la filmon "Grafo Monte Kristo"?

- Certe, mi spektis kaj plaĉis al mi. Kial?

- Tiel estas viaj lipoj- lia rigardo delonge kisis ŝiajn lipojn.

- Kiel? Mi ne komprenas cin- ekridis Vera, vidante

>>12

Mi estis ankoraŭ infano. Aŭtoj maloftis tiutempe, kiam infanoj inkluzive de mi ĝojis kuri kaj galopi pli ol ĉevaloj.

Mi ankoraŭ memoras, ke iun tagon, apudpasante pastron -- tiutempe oni renkontis pastrojn pli ofte ol hodiaŭ -- mi aŭdis lin flustri al kunparolanto tri latinajn vortojn, sed mi aŭdetis nur du el ili, nome, '**ultima dea**' (la lastan diinon). Tio verŝajne ne interesis min tiuaĝe kaj mi daŭrigis kuri kun la celo plenigi la ordonon de mia patrino, nome, viando-aĉeton. Ridinde, sed ho ve, la viando ne plaĉis al mia patrino kaj mi devis reiri al la viando-vendejo por ŝanĝigi ĝin. Sed tio estas alia historio.

Kiam mi maturiĝis, la studado rememorigis min pri tiuj du vortoj aŭditaj infanece el la buŝo de tiu pastro. Tamen ĉifoje mi lernis plian vorton, fakte la antaŭan al tiuj du, ĝis mi lernis la tri vortojn: '**spes ultima dea**' (la espero(estas) la lasta diino).

La lasta diino! Do kiom da dioj ekzistas, mi balbutis al mi mem? Tamen mi sentis, ke facilas tion ekspliki, nome laŭ onies kompreno de 'dio'. Ĉio en la mondo povas esti dio, t.e. ni rigardas ĉion laŭ nia intereso en ĝi. Nu laŭ la Biblio, ankaŭ laŭ la Korano, nur unu Dio ekzistas (kun majuskla D), kvankam laŭ la romianoj kaj kompreneble laŭtradicie unu el la dioj (kun minuskla d) estas 'Espero'.

Ĉiu homo sentas, ke li vivas ĉiam esperante. La plej ekstremaj kazoj estas malsanulo kaj mortanto. Ĉar kiam oni malsaniĝas, oni esperas je saniĝo, kaj tio ... ĝis la morto. En ambaŭ kazoj, ĉe la fino oni ne bezonas plu esperon, oni ne plu petas ĝin, oni ne plu atendas ĝian efikon, ĉar ĝi estas jam mortinta: **ultima dea** (la lasta diino).

Mi kredas, ke la du naziaj politikistoj Goebbels kaj Göring, la servutuloj de Hitlero en la lasta mondmilito, ege fervoris al dio-espero. Sed Hitlero sekrete perfidis ilin tiel ke kiam ili troviĝis antaŭ nepenetrebla muro, ili fine ambaŭ sin mortigis. Tiel, la esperon ili en si mem mortigis antaŭ ol ĝi eble povis ilin alhelpi.

Ĉi tie permesu al mi entrudi alian gravan vorton: **fidon**. Mi skribas ĝin minuskle kaj prave por ne miksi ĝin kun tiu majuskla, nome la religia Fido. Kiam oni esperas, oni fidus ion, t.e. oni kredas, ke io alhelpos vin, tiel vin ĝojigante. Tamen iusence ambaŭ fidoj



alsimilas.




Søren Kierkegaard kredas, ke la Fido (kun majuskla F) estas nenio alia ol salto tra miloj da kilometroj de maro. Tio signifas, ke li sin ĵetis kun fermitaj okuloj kredante je Dio. Sed ĉu la alia fido, t.e. Espero, ne similas al ĝi? Ĉu tiam oni ne plonĝas sen pripensi en la futuron esperante akiri ion pli bonan?

Mi ĵus menciis Hitleron. Bone. Li memorigas min pri Pampero, tiu ventego balaanta la Pampas, t.e. la verdecan etendaĵon de



Urugvajo. La potenco de tiu vento trans la atlantika marbordo estas konsiderata kiel timiga. Nu ambaŭ Fido kaj fido similas al Pampero, galopanta ĉevalo, nenion timanta ĉar tiu, kiu ilin brakumas scias, ke tiom necesas esperi por esti kontenta. Jes, per grandaj oferoj kaj per responsoj preskaŭ neelteneblej, sed kun malkvietiga firmeco, kondiĉe ke oni **esperu** (spes) ke **fine** (ultima dea) tion kion vi deziras vi akiros. Kaj ĉar ĉi tiu dio (kun minuskla d) ne multe helpas, ni uzetas ĝin ne vivante sen ĝi.



La muzikisto Mahler en la enkonduko al sia dua simfonio demandis, per siaj notoj kompreneble, -- ĉar eĉ muzikistoj faras demandojn per siaj notoj -- ĉu li povus eskapi el morto. Li esperis, kvankam li subkonscie certis, kiel ĉiuj, ke fine la ĉevalŝuoj jam ne tretos ĉi tiun teron kun malsanecaj plat-ŝtonoj en strato kondukanta al nekonata ie.

Tamen la homo ĉiam timemas. En angla medicin-etika ĵurnalo oni antaŭ nelonge skribis, ke iuj nekredantaj kuracistoj kuraĝas mallongigi antaŭtempe la vivon de mortantoj, aldonante morfino-kvanton. Sciante tion, kuracisto rimarkis, ke, se li estus ĉe la fino de sia vivo, li dezirus scii, kiun religion konfesas la specialisto lin kuracanta, pro la influo kiun la religio povus havi en lia decido. Tiel, laŭ li, nekredanta



kuracisto ne devas permesi, ke lia kredo influu liajn decidojn.

Spes ultima dea (Espero, la lasta diino). Tiel kredis la romianoj. Tiel ek de ĉiam kredis, kaj ankoraŭ

kredas la homaro. Ĉar tiel ja estas.

verkis kaj sendis **Carmel Mallia** el Malto

La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj -- de Vytautas Petkevičius

tradukis kaj sendis
Antanas Vaitkevičius el Litovio

7. Tio, kion Pizo povis nek tuŝi, nek flari

Ĉirkaŭirinte kelkajn fojojn la grandegan arbon en kiu kaŝis sin la besto, rapidulo observis nenion suspektindan, li nur ege tediĝis kah sidiĝis sur ia bruna arbostumpeto por ripozi.

Tamen kiel li teruriĝis, kiam sentis, ke la arbostumpo moviĝas kaj levas lin supren. Pizo rapide saltis for de ĝi kaj pretiĝis defendi sin, sed neniu atakis lin.

Kiam musko disiĝis, Rapidulo ekvidis, ke la bruna arbostumpeto transformiĝis en brunan ĉapon. Post ioma plua tempo aperis ankaŭ la svelta trunko de la ĉapposedanto.

- Saluton, - nekuraĝe etendis al li sian manon Rapidulo. - Sed mi tute ne konas vin.

- Mi estas Lekceneto. Fi, kiel ĉi tie estas malvarme!

Dum ili intersalutadis, Lekceneto egalkreskis al Pizo.

- Kiel vi fartas? - daŭre paroligis la nekonatulon Pizo.

- Mi jam verŝajne al morto proksimiĝas. Sub musko mi preskaŭ mortsoifis, kaj ĉi tie mi devos pro malvarmo mian vivon perdi, - plendante la malfortulo superkreskis Pizon. - Krome, iu ajn mian ĉapon flankenigis.

- Mian amikon kaptis terurega besto, sed mi eĉ pro tio ne plorplendas kaj pretiĝas lukti. Pacienca ankaŭ vi.

- Mi ne paciencos!

- Ne estu tia maltaŭgulo. Gimnastigu, varmiĝu kaj malaperos la skuado.

- Mi timas, ke mi varmiĝos, ŝvitiĝos, poste vento min trablovos kaj mi akiros nazkataron. Mi ege timas nazkataron.

Dum ilia konversacio Lekceneto transformiĝis en veran Lekcenon. Tion rimarkis ankaŭ Boletito. Li malfermis la ŝvelintajn okulojn, spiroblovis siajn lipharojn kaj grumletis per kolonela voĉo:

- Imitas la boletan kreskadon!

Vekitaj de la kolonela voĉo, ĉirkaŭ Lekceneto amasiĝis suiloj, armilarioj, laktarioj, rusuloj kaj aliaj malgrandaj fungetoj. Ili flankenpuŝis Pizon, kuniĝis per brakoj kaj, dancante en rondo, kriitis:

- Vivu la plej boleta Lekceneto!

- Hura por unu-kaj-duona Lekceneto!

- Lekceneto estas Boletito hodiaŭ!

Pro tia laŭdado la molulo mukokovriĝis.

- Li povus esti multe pli granda, sed...

- la kolonelo fermis okulojn kaj ekdormis.

- Li povas, certe li povas! - unuvoĉe reeĥis malgrandaj fungetoj kaj eksuprentiris Lekcenon je liaj oreloj.

- Mi ne eltenos! - baraktis per gamboj malfortulo.

- Ni subtenos vin per siaj ŝultroj! - malpermesis por li malfermi la buŝon laktarioj.

- Mia kapo turniĝas, - murmuris la malfortulo.

- Mordtenu je via kolumo! - konsiladis suiloj.

- Mi ne eltenos! - ploraĉis la feblulo.

- Ni helpos vin, - lin kuraĝigis armilarioj.

Lekceneto pligrandiĝis kvazaŭ li estus fermentita. Laktarioj, suiloj, armilarioj, rusuloj kaj aliaj malgrandaj fungetoj jam ne sukcesis atingi liajn orelojn, do ili grimpadis unu sur la alian kaj senripoze tiris, trenis eĉ dentojn montrante. Kaj Lekceneto konstante pligrandiĝis. Baldaŭ la malgrandaj fungetoj ne povis atingi ne nur la lekcenajn orelojn, sed ankaŭ liajn poplitojn, tamen ili daŭre kriegadis:

- Kresku, plialtiĝu, ni helpos vin!

Pizo penetris tra krieguloj kaj diligente diris:

- Nu, vi ege plialtiĝis, fraĉjo! Eble nun vi povas levi min ĝis la branĉo de tiu arbo?

- Ne, mi ne levos, mi timas ke mi tirvundiĝos.

- Ja vi min jam centoble superas.

- Pro tio mi ne povas, mia stipo povas klini sin.

Pizo ekkoleregis terure, tamen li ne povis permesi sinflamiĝon. Lian amikon ĉiumomente povis gluti la terura besto. Tio kaŭzis lian petadon. Kaj Lekceneto ploretis, serpentumis kaj ne deziris forlasi sian muskan liton. Tamen eĉ ne movante tiu malkuraĝulo kreskis neimageble: kun ĉiu vorto po spanon, kun vorto la dua - po du, kvazaŭ fermentiĝante la mukulo spiregis, plivastiĝis, ĉion kovrante per sia ombro. Pizo eĉ kaŭriĝis pro miro: kiom granda tiu Lekceneto povas kreski dum unu tago.

- Aŭskultu, vi, pigremulo, vi jam estas mil fojoj pli granda ol mi. Por vi nenion signifas levi min. Vi movu nur sian fingreton kaj mi savos mian amikon.



- Mi ne povas, mi apenaŭ mian ĉapon surteni kapablas. Mi mankas sanon.

- Ja vi estas tiel granda.

- Pro tio mi estas granda, ke ĉiuj helpas min, kaj mi helpas neniujn.

- Falaĉu vi for de via stipo! –kraĉis Pizo kaj forkuris por serĉi helpojn alien.

- Ni helpos lin! – kriegis la malgrandaj fungetoj.

Inter du piceoj, pendiginte grandegajn okulvitrojn surnaze, retojn trikis Araneo.

- Aŭskultu vi, trikisto, ĉu vi ne povus helpi min en malfeliĉo? –demandis lin Rapidulo. – Mi tre urĝas.

- Se vi ne estas muŝo, bonvolu, - respondis la ĝibulo.

- Mi estas Pizo. Kaj mia amiko Glano trafis malfeliĉon. Li estis kidnabita de ia bruna besto kun elpufiĝintaj okuloj.

- Ĉu tiu besto loĝas en arbotruo?

- En arbotruo.

- Ĉu grimpadas en arboj?

- Grimpadas.

- Mi ne helpos.

- Kial?

- Tial, ke mi ankaŭ la samon faras.

Pro tiuj vortoj ĉio nigriĝis en la okuloj de Pizeto. Li jam tute ne konis nek kiel peti, nek kiel petegi tiun durkoran insidulon, trikantan la netojn de malfeliĉo. Tra liaj verdaj vangoj ekfluis kelkaj larmoj.

- Kial vi ploras? - ekmiris Araneo.

- Amiko pereas, - ĉagreniĝis Pizeto.

- Amiko ne estas vi.

- Tutegale mi devas helpi lin.

- Se vi volas, mi diros al vi: via amiko falis en la manojn de Sciuro.

- Eble kulpas Sciuro, sed tutegale mi devas helpi lin.

- Tio ne estas necesa, - kapneis Araneo. – Ĝis la vintro nenio minacas lin.

- Vi estas la plej granda senkorulo de la arbaro, - ekkoleris Pizeto. – Kiel mi povas atendi tiom loge?

- Mi ne ordonas vin. Dum tiu tempo vi trovos dek pli bonajn amikojn.

Tiuj vortoj definitive kolerigis Pizon. Li rigardis al Araneo, en la pinan pinglon en sia mano kaj nedecideme paŝetis antaŭen. Senpacientiĝis ankaŭ Araneo.

Li rektigis la okulvitrojn kaj atenteme rigardis la Rapidulon.

- Ĉu vere vi ne estas muŝo? – demandis li Pizon.

- Bonvolu. Jen la dokumento,- apenaŭ sin kontrolis la verdvango.

Araneo foliumis la pasporton de Glano kaj redonis ĝin.

- En la pasporto estas skribita, ke vi estas Pizo, ke vi estas Rapidulo, sed nenie estas skribita, ke vi ne estas muŝo.

- Mi estas Pizo kaj neniuj plu.

- Kiu povas koni pri vi? Nuntempe diversaj uloj troveblas.

- Kiel mi povas pruvi al vi, ke mi ne estas muŝo?

- Tio estas via problemo.

- Se mi estus muŝo, mi ne devus peti por helpo. Mi memforte al la arbotruo flugas.

- Veron vi diras. Ĉiuj manĝeblaj objektoj flugas, kaj nemanĝeblaj ĉiam staras en unu loko. Se vi flugas, mi konus, kio estas farenda kun vi. Sed kion mi faru, se vi ne flugas? Aliru pli proksimen, nepalpadinte vin, mi vin ne povas kredi.

- Jen, palpado! – Pizo disŝiris surbruste sian ĉemizon. – Nur bonvolu urĝi.

- Kaj kiu palpados vian amikon? – eĉ ne moviĝis Araneo.

- Ascendu la arbon kaj vi mem lin esploru! – plu ne eltenis Pizo, kaj vidante, ke tempo estas malŝparata, pikis lian dorson per la pina pinglo: - Nu, moviĝu, ĉar kontraŭe mi trapikos vin kiel ranon.

La ĝibulaj okulvitroj preskaŭ falis surteren pro timo. Li urĝe kaptis faskon da ŝnuroj surŝultrigis ĝin kaj diris:

- Nun mi vidas, ke vi ne estas muŝo.

Pizo irigis la nekredeman loĝanton de arbaro en la lokon de la malfeliĉa okazintaĵo kaj haltis surpriziĝinta. Lekceno balancadis kvazaŭ ebria, nesurtenante sian grandegan ĉapon, kaj ŝvitintaj malgrandaj fungetoj subtenadis lin je ĉiuj flankoj. Ĉies buŝoj estis malfermataj, sed ili ne kapablis plu krei pro raŭkiĝo.

Subite Boleto vekiĝis pro nekutima silento, malfermis unu graskovritan okulon kaj ekvidis apud si ĵus elkreskintan Ruĝlekceneton. Li ridetis al la etulo kaj okuluminte en ĉefa maniero, demandis:

- Vidas mi, ke vi kreskas? Plu kaj plu vi supreniĝas. Sed atentu kaj ne falu!

Ĉiuj laktarioj, suiloj, armilarioj, rusuloj kaj aliaj malgrandaj fungetoj kuris al la Ruĝlekcceno, kaptis liajn orelojn kaj, dancante en la rondo, kantis:

Hodiaŭ Lekceneto
Kaj morgaŭ funga estro,
Tion ja anoncis
La kolonel' Boleto.

Restinte sola la maljuna Lekceno ankoraŭ balanciĝis por kelkaj momentoj kaj falegis surteren. Lia ĉapo diskaĉiĝis, trapikiĝis tra la mukiĝinta stipo kaj el la grandeco de la malfortulo postrestis nur malagrabra odoro.

- Vera Lekcenaĉo! – mansvingis Pizo.

- Tutan lian vivon li estis tirata je oreloj de siaj amikoj, tial li falis teren tro frue, - diris Araneo. – Kvankam li ne estis muŝo, sed vera maltaŭgulo li estis...

- Finfine vi ekparolis! – piketis la araneon per pina pinglo Pizo. – Kaj kiel vi scias nepalpadinte?

- Tia ulo estas rekonebla laŭ odoro, - respondis sub la portaĵo kurbiĝinta ĝibulo.


Alirinte al la arbo, Araneo grimpis la arbopinton, ligis finon de la ŝnuro al la branĉo kaj poste malsuprenirante, plu trikis la ŝnuron. Kiam li atingis

teron, Pizo inspektis la fortecon de la ŝnuro kaj ekgrimpis supren. Araneo glitgrimpis post li.

(daŭrigota)

"La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj" estas libro de litova verkisto Vytautas Petkevičius (1930 – 2008). Li estas sufiĉe konata kaj precipe fama pro siaj porinfanaj kreaĵoj.

Ŝercoj



MALFRUE

Baniko venas hejmen post la labortago. Rozino, lia edzino: Vi venas malfrue, Banĉjo. Ĉu vi devis labori pli longe

hodiaŭ?

Baniko: Ne, multe pli terure ol tio. Mi ekdormis ĉe mia skribotablo, kaj neniu vekis min je la fermohoro!

TUTE NOVA JARO

Baniko: Hodiaŭ estas la komenco de tute nova jaro! La aferoj ĉiam ŝajnas tiom malsamaj je la 1-a de januaro. Kruko: Ne timu pri tio. Morgaŭ, la aferoj denove estos jam tute normalaj....

HISTORIO

En la lernejo, eta Toĉjo demandas al eta Joĉjo: Kie vi estis hieraŭ?

Joĉjo: Mi estis malsana. Kion vi faris en la lernejo hieraŭ?

Toĉjo: Ni finis la ĉapitron pri la Mezepoko, kaj nun ni komencis studi la Renesancon.

Joĉjo: Ho ve! Mi maltrafis unu tagon, kaj subite mi malfruas kvar jarcentojn!

tradukis **Rikardo Cash** el Francio publikigita kun lia permeso

Fonto: esperanto-anekdotoj@googlegroups.com



Kripta Krucvortenigmo



Rekonstruu krucvortenigmon anstataŭigante ĉiun numeron per litero.

Fonto: Semajno de Enigmoj #8
<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo troviĝas en paĝo 31)

1	2	3		4	5	6	5	7	D	8		9	B			
2	10		11	8	12	8	10	5	13	9	8					
11	2	10		6	14	15	5	16	10	8						
13	R	E	E		14	10	3	17	15	8	16					
3			18	3	6	19	14	13	8		11	8				
		20	F	8	1	3	5	13	5	10	22	Ĝ	8	10	N	
6	S	5	A	1	L	3	I	18	V		8	15	8		12	8
17	G	13	14	10	8			16	8	10	3	8	10			

Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis leteron de mia malnova amiko Mikaelo. Mi sufiĉe ekmiris, ĉar leterojn ni neniam skribis unu al alia. Li turnis sin al mi tiel :

„Estu salutata la reĝo de pigruloj, tempodisipanto kaj verkistaĉo!

Ĉu vi iomete ofendiĝis? Nu, tio estu je via sano! Mi skribas al vi pro tio, ĉar venis la tempo preni vin je nuko kaj skui vin, kaj skrapmalfermi viajn okulojn. Mi sentas, ke mi havas tian rajton, ĉar mi laboras por Esperanto ekde mateno ĝis vespero. Kiam mi rememoras niajn sencele pasigitajn tagojn, min kaptas teruro – kial ni ne scipovis vivi, kial ni ne kapablis labori...? Vi verŝajne ekdemandos, ĉu mi jam lernis tion?

Mi rekonas vian malsukcesan ironion. Vi tion scipovas. Mi povas diri, ke mi finfine perceptis, kio estas intensa, anima vivo.

Mi legis viajn laste verkitajn humuraĵojn. Kiom da senbezona ekscitiĝo kaj akra sarkasmo ili enhavas! Ĉu vi pensas, ke tiaj viaj verkaĉoj edukas kaj vekas anime niajn esperantistojn kaj havigas al ili flugilojn? Pli bone oni kantu alaŭde, vekante kaj refreŝigante Esperanto-literaturon en la koroj de gesamideanoj. Mi invitas vin reveni al tia anima stato, kiun vi estis, sendube, atinginta iam antaŭe.

Al mi ŝajnas, ke ni ĉiuj forgesis, kio estas bonkora, noblanima interrilatado, kunlaboro. Etaj ambicioj, kolerio, krudeco, eldrinkado, korupto, maltoleremo, fiaj, abomenaj pensaĵoj: – tio ne estas fundamento, sur kiuj sin tenas nuntempe interhomaj rilatoj. Pro tio mi memorigas al vi : – ne forgesu vi, ke nia devo estas gardi kaj sanigi esperantistan popolon for de tiu malbono. Mi esperas, ke vi tutan energion kaj forton dediĉos al batalo por noblanimo de esperantista komunumo. Venis la tempo finfine en la konscio de samideanoj restarigi tiun nocion, necesas, ke ĝi brilu ĉiam kaj ĉie, kaj ĉiuj esperantistoj estu gefratoj. Ĉar tuta nia malmultnombra esperantista komunumo ne

iĝos tuj nur spertuloj kaj aktivuloj. Oni ne ŝanĝiĝos en unu tago. Tion oni efektivigu paŝo post paŝo. Des pli, ke multaj esperantistoj viajn verkaĉojn ne komprenas kaj ne legas, eĉ plej proksimaj viaj geamikoj. Kaj de via edzino ĉu vi ne ricevas baton? Mi pensas, ke vi kun via verkado ne instigos niajn esperantistojn esti pli bonaj. Al tiuj, similaj vin, ne estas loko inter ni. Kaj neniam estos.“



La liniigita paperfolio estis plenskribita ĝis la fino. La letero min ekscitigis kaj nerimarkeble mi komencis envii mian amikon Mikaelon pro lia animklariĝo kaj grandanima vervo. Mia koro bategis kaj sin ĵetadis kvazaŭ blinda kato serĉante eliron el la ĉambro, en kiu estas nek pordo, nek fenestro, nek kamentubo.

Malgraŭ ĉion mi returnis alian flankon de la letero kaj tie mi trovis tian post skribon:

„Ne plu verku kaj ne kritiku esperantistojn, ĉu bone? Ĉu ni interkonsentos? Ĉar al vi nek gloro, nek mono, nur kapdoloro. Se vi volos respondi al mi, vi ne penu. Mi ne bezonas vian respondon. Mikaelo“

Ekcerbumis mi profunde kaj enhance pri la homo inter homoj. Mi longe pesis la faktojn kaj fine kaptis veron: la sorto estas kruela. Ĝi regas la pulson de la vivo. Avantaĝo, kiun mi sentis antaŭ aliaj, po iomete estingiĝis, bonhumoro falis, la vivo ŝajnis sensenca. Mi pensis malproksime postrestinta samtempulojn...

Ne, tiel ne plu eblas. En la vivo plej gravas io alia, kaj mi, interalie, scias, kio estas tio. La vero – unu, la amo – du... Mikaelo estas mia amiko, sed la vero – pli gravas.

Malgajni mi ne estis al kutimiĝinta. Se mi silentos, tiam estos al mi „kaput“. Do kion fari ?


Mi ne povas silenti, mi verkos plu!

verkis kaj sendis **Laimundas Abromas** el Litovio

Kornikoj kaj nuboj en griza ĉielo
Dancadas laŭ fluto de l' pluva venteg'
Forpasis somero senzorga kaj bela,
De l' griza aŭtuno komencis la reg'.

Kunpremas animon la fluto de l' vento
Kaj koron invadas malklara dolor'
Kaj sentas mi certe dum eta momento,
Ke pluvos,... ke pluvos... Jes, pluvos - en kor'.

verkis kaj sendis **Antanas Vaitkevičius**
el Litovio



Insulo de la Rozoj



En la jaro 1968 la homoj komencis paroli pri novaj ideoj, povo de la popolo, libereco por ĉiuj. En Italio, kiel tra tuta Eŭropo kaj la mondo, tiuj ideoj fariĝis realaj, konkretaj, foje eĉ ŝtonaj: en la Adriatika Maro, 12 kilometrojn for de la itala marbordo, kaj 500 metrojn ekster la itala teritoria limo, Giorgio Rosa konstruis sian liberan ejon, kiu havis la nomon Esperantista Respubliko de la Insulo de la Rozoj. Rozo estas ankaŭ la familia nomo de la konstruisto, tradukita el la itala.

Por montri ke la Insulo havas internacian celon, la lingvo de la malgranda (je 400 kvadrataj metroj) nacio estis Esperanto, sed la nacia kanto estis en la germana, el la verko de Wagner La fluganta nederlandano. La insula registaro presigis poŝtmarkojn en Esperanto, kaj la nacia koloro estis la verdo.

Neniu loĝis sur la insulo, sed okazis sur ĝi multaj dancofestoj, kaj multaj homoj vojaĝis al ĝi el la itala marbordo per malgrandaj ŝipoj. La insulo estis tre fama inter la turistoj.

Malgraŭ la fakto ke la insulo estis ekster la italaj landlimoj, la itala registaro timis, ke la komercaj agadoj okazantaj sur la insulo ne pagos impostojn al la ŝtato. Tial la polico esploris, ĉar italoj devas respekti la naciajn leĝojn eĉ se ili estas en eksterlando; farante tion, tamen, la itala registaro montris, ke ĝi konsideras la Insulon aparta "ŝtato". Sekvis mallonga jura batalo, kiun la Insulo malgajnis: la 11-an de februaro 1969 la polico malkonstruis la insulon.

Hodiaŭ restas malmultaj memoraĵoj de la mallonga vivo de la Respubliko: poŝtmarkoj kaj flagoj, kaj multaj paĝoj de la informfolioj de tiuj tagoj. La

konstruisto, Giorgio Rosa, mortis antaŭ kelkaj jaroj, sed vidis sian laboron memorigita per pluraj libroj. En 2012 aperis romano verkita de la iama urbestro de Romo, Walter Veltroni. Ĝi estas bazita sur la historio de la Insulo, kaj enhavas kelkajn frazojn en Esperanto (ne ĉiuj estas ĝustaj).

En 2020 aperis bela filmo pri la Insulo, La nekredbla rakonto pri la Insulo de la Rozoj, kiu gajnis plurajn premiojn ĉe la du plej gravaj filmkonkursoj de Italio. La filmo estas spektebla en la kanalo Netflix en la itala kun subtekstoj en la angla kaj pluraj aliaj lingvoj.

La Insulo estis la plej konata "lando", kiu havis Esperanton kiel propran lingvon. Alia estis la eta neŭtrala teritorio Moresnet. Ĝi nun apartenas al Belgio, sed de 1816 ĝis 1919 ĝi ekzistis kiel aparta teritorio inter Belgio kaj Germanio.

Norberto Saletti

Norberto Saletti estas itala esperantisto el Bolonjo; tre aktiva dum sia juna aĝo, li dum longa tempo ĉesis aktivi, sed revenis al la movado kaj nun redaktas informilon de Itala Esperanto-Federacio.

Novaj vortoj

imposto: deviga pago de ŝtatoj kiel kontribuo al la bezonoj de sia ŝtato aŭ urbo.

jura: rilata al la leĝaro de ŝtato.

kanalo: la vojo por disendi la programojn de difinita radia, televida, aŭ reta organizaĵo.

registaro: grupo de homoj, kiuj regas ŝtaton.

respubliko: ŝtato, kies estro ne estas reĝo, sed homo elektita de la popolo.

spekti: rigardi filmon, teatraĵon, televidan programon aŭ simile.

teritorio: regiono apartenanta al iu ŝtato aŭ popolo, kiu konsideras ĝin propra kaj defendas ĝin kontraŭ enveno de eksteruloj.

Publikigita laŭ propono kaj permeso de Anna Löwenstein

Fonto: <https://uea.facila.org/artikoloj/%C4%9Denerale/insulo-de-la-rozoj-r245/>

(daŭrigata)

1.2. Esperanto en tiu periodo en Britujo kaj Francujo

Kiel ni scias Esperanto naskiĝis en Orienta Eŭropo kaj disvastiĝis tie kaj poste en Okcidenta Eŭropo. Tion montras interalie la adresaro de la unuaj 1000 esperantistoj eldonita en 1889: Rusujo 919, Germanujo 30, Aŭstrujo-Hungarujo 22, Britujo 9, Francujo 6, Svedujo 4, Usono 4, Turkujo 2, Ĉinujo 1, Hispanujo 1, Italujo 1, Rumanujo 2 ¹⁴. Pri Britujo esencan rolon ludis tiu sama W. T. Stead, kiun ni jam menciis pri liaj rilatoj kun Cecil Rhodes, kaj lia admiro pri liaj ideoj. Efektive W. T. Stead, estis tre malkonformisma homo, kiu subtenis multajn kauzojn, estis en malliberejo pro artikoloj kontraŭ prostituiteco en Britujo, ktp. Fakte kvar monatojn post la apero de la unua libro de Esperanto en 1887 Stead aperigis artikolon pri ĝi en la londona gazeto *St. James Gazette*, kiun li redaktis. Tio estis la komenciĝo de Esperanto en Britujo. Kompreneble la ĝenerala reago de la publika opinio estis negativa. Alia ĵurnalo, *Glasgow Times*, komentis, ke eĉ Stead ne sukcesos trovi lernantojn por Esperanto. Sed en limigita kvanto lernantoj tamen estis trovitaj. Evidente temis pri homoj nekonformismaj, kiel Stead mem, kiuj legis la postajn artikolojn en *Review of Reviews*. ¹⁵

Same en Francujo la akcepto de Esperanto okazis fare de individuoj ne influataj de la ĝenerala 'kontraŭesperanta' mondorigardo ¹⁶.

En la unua adresaro de 1889, enhavanta la nomojn de la mil unuaj Esperantistoj, troviĝas la nomoj de Louis de Beaufront, instruisto, Henri Delachaŭ, desegnisto-gegorafiisto kaj Demonget, kiu antaŭe okupiĝis pri Volapuko.

Beaufront aliĝis al Esperanto en 1888, Demonget en la komenco de 1889 kaj en la somero de tiu sama jaro Gaston Moch.

Dum kelkaj jaroj Beaufront povis fari nur propagandon "individuan", tre efikan sed kompreneble tre malrapidan. Dume Beaufront tradukis en francan lingvon verkojn de L.L.Zamenhof kaj publikigis lernolibron.

En 1897 Moch publikigis ĉe Giard et Briere, grava pariza eldonisto, broŝuron (aparta represo de artikolo el la "Revue Internationale de Sociologie"), kies plano kaj argumentoj estis poste centfoje reuzataj de la verkantoj de broŝuroj aŭ paroladoj por propagando.

En la 31-a de marto 1900 Moch faris paroladon

pri Esperanto en la Lernejo pri Ĵurnalismo en Parizo. Post la parolado multaj ĉeestantoj kuniĝis en la skribĉambro de la sekr. f-ino Dick May kaj decidis fondi Grupon Esperantistan, kiu ĝis tiu dato ne ekzistis en la ĉefurbo.



2. En la unua duono de la 20-a jarcento

2.1. En la Societo de Nacioj – la unua vera persekuto de Esperanto

La agado por Esperanto ĝuis belan periodon en la komenco de la 20-a jarcento ĝis la unua mondmilito. Ne necesas citi apartajn verkojn pri tio. Certe trastudo de la Sekcioj de *Esperanto en Perspektivo* ¹⁷ povas sufiĉi. Ĝenerale konataj estas la unua monda kongreso en Bulonjo-ĉe-maro en 1905, la postaj kongresoj interalie en Britujo kaj eĉ en Usono en 1910 kaj la fondo de Esperanto-grupoj tra la tuta Eŭropo kaj parte tra la mondo.

Post la interrompo pro la granda milito en Eŭropo, la agado por Esperanto reprenis kun granda energio, sed tiam la Esperanto-movado ricevis la unuan seriozan baton. Ĉi-foje la persekutanto estis Francujo.

Je la fino de la unua mondmilito, kunlige kun la packonferenco en Versailles en la jaroj 1919-1920 oni fondis la Societon de Nacioj oficiale la 28-an de junio 1919. Temis pri la unua versio de internacia organizaĵo por solvi internaciajn problemojn kaj eviti militojn.

Jam en la posta jaro, la 19-an de decembro 1920, 11 delegitoj prezentis proponon pri rezolucio pri Esperanto. Malantaŭ la propono estis la agado de la jura konsilanto de la persa delegito, la poste tre fama esperantisto Edmond Privat. La reago de la franca delegito estis tre malfavora. Bonvolu konsideri nur la jenajn vortojn: "Jam ekzistas internacia lingvo: la franca, universale instruata ĉie en la mondo de la penso." ¹⁸ Tiu franca delegito estis grava franca politikisto, iama ministro pri eksterlandaj aferoj, kiu, kiel la ministro pri publika instruado Léon Bérard, timis la konkurencon de Esperanto al la rolo de internacia lingvo, kiun tiam havis la franca. La ministro eĉ malpermesis la instruadon de Esperanto en ejoj apartenantaj al la francaj lernejoj. Ili evidente ne perceptis, ke la rolo de la franca jam estis minacata de la angla. Ĉiuokaze la propono estis forŝovita al la Ĝenerala Konferenco de la posta jaro.

Malgraŭ la favora raporto de la Ĝenerala Vicsekretario Inazo Nitobe, kiu vizitis la tiujaran Universalan Kongreson en Prago, kaj malgraŭ la

subteno de 13 delegitoj¹⁹ pro la daŭra kontraŭstaro de Francujo oni akceptis la raporton sed sendis al la Internacia Komitato por Intelektala Kunlaborado la ŝlosilan parton, tio estas la rekomendo pri instruado de Esperanto en la lernejoj de la membraj ŝtatoj.

En la kunveno de la Internacia Komitato la franca reprezentanto, senatano G. Reynald deklaris, ke li ricevis instrukciojn malaprobi la proponon, kaj tio finis la debaton.

La sola subprodukto de la iniciato estis la rekomendo ke Esperanto estu konsiderata klara lingvo en telegrafaj komunikoj, kion la Universala Telegrafa Unio akceptis en 1925

Iusence la francoj sukcesis haltigi Esperanton en sia plej bona momento, kiun oni poste neniam plu reatingis pro sinsekve la naciismaj kaj naziaj registaroj en Eŭropo, la dua mondmilito, la malvarma milito, la rolo de la angla, ktp.

2. 2. Ceteraj okazaĵoj en la sama periodo en anglalingvaj landoj

Se la francoj ne rimarkis ke la angla komencis okupi poziciojn en la areno de internaciaj lingvoj, la angloj pluiris laŭ siaj 'imperialaj' ideoj ankaŭ post la unua mondmilito. Kiam mi diras "la angloj" tio devas esti komprenata kiel la reganta angla elito kaj la konservema parto de la publika opinio.

En la dua duono, la pure rasismaj konsideroj de la antaŭa jarcento estas forlasitaj sed ne la ideoj pri la supereco de la angla civilizo.

Ideojn pri tiu supereco havis C. K. Ogden. Charles Kay Ogden (1889 – 1957) estis angla lingvisto, filozofiisto kaj verkisto. En 1925 li produktis sian *Basic English* (Baza angla), plene priskribita en libro aperinta en 1930. Temis pri ideo disvastigi en pli facila maniero la konon de la angla lingvo al ĉiuj. Ogden estis konvinkita, ke la mondo bezonas malaperigi malgrandajn lingvojn laŭgrade kaj uzi laŭeble nur unu, la anglan en formo simpla aŭ kompleta.

Ogden klopodis simpligi la anglan por ĉiuj neangloj, dum ĝi restis la normala angla por angloj. Praktike oni havis serion da gramatikaj simpligaj reguloj kaj malgrandan vortaron, per kiu oni povis priskribi preskaŭ ĉion, kion oni bezonis.

La 850 bazaj vortoj de Ogden estas teorie sufiĉaj por la ĉiutaga vivo, sed laŭ li ĉiu studento povas lerni 200 kromajn vortojn en sia labor-kampo. Krome Ogden supozis, ke ĉiu studento iel konas 200 internaciajn vortojn. Se al tio oni aldonas vortojn pri la ĝeneralaj kampoj de komerco, ekonomio kaj scienco, en la fino oni havus vortaron de 2000 vortoj, kiu similas al la angla vortostoko normale posedata.

La afero estis vaste konata en Britujo kaj laŭdata kiel maniero alproprigi la anglan al tiuj bedaŭrinduloj, kiuj ne posedas ĝin denaske.

(daŭrigota)

artikolo de **Renato Corsetti** el Britio

Fonto: https://www.academia.edu/37359946/Corsetti20180627_fina?email_work_card=view-paper

¹⁴ El https://eo.wikipedia.org/wiki/Adresaro_de_la_Esperantistoj.

¹⁵ *Harry Holmes (1981), Londono vokas 1903-1978. Historio de la Londona Esperanto-Klubo, London: Londona Esperanto-Klubo, paĝo 7.*

¹⁶ *Libere reverkita surbaze de la informoj en http://epo.wikitrans.net/Historio_de_Esperanto?src=Historio+de+Esperanto.*

¹⁷ *Lapenna, Ivo, Lins, Ulrich, Carlevaro, Tazio (1974), Esperanto en Perspektivo - Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo, UEA/CED: London – Rotterdam.*

¹⁸ *Lapenna, citita verko, paĝo 768 kaj sekvaj.*

¹⁹ *Suda Afriko, Rumanujo, Persujo, Belgujo, Ĉeĥoslovakujo, Kolombio, Ĉinujo, Finnlando, Albanujo, Japanujo, Venezuelo, Hindujo kaj Pollando (kun kelkaj kondiĉoj).*

27>> amindan raŭpon, sed kiel miraklo brun- nigran papilian pupon. Tiu pupo dormis.

Ekzakte Pentekoston ĝi fariĝis noktano papilion. Ĝi forflugis.

Dankeme ĝi revenis al la mano kun ĝardenaj manŝuoj de mia edzo en ĝardeno kiel diri dankeme AŬDIAŬO.

En nia korto apud la domo ni havas sidejon. Ofte ni manĝas tie en la bela naturo. Apude ni plantis arbuston de papilia saringo.

Kiam ĝi floras bele en violaj, pinkaj koloroj, venas

belegaj papilioj, ankaŭ vespere noktanoj brunaj papilioj. Kelkfoje mi nombris ĝis 20 diversajn papiliojn kune. Eblus, ke ĉeestis nia aminda iama verda raŭpo aŭ postidoj.


verkis kaj sendis **Helga Plöetner** el Germanio

Ses tagojn semajne, de lundo ĝis sabato, konstruaj agadoj okazas ĉie cirkaŭ mia domo. De la 6a ĝis la 18a horo, la bruo de maŝinoj resonas en miaj oreloj. Ĉi-sube mi montros al vi la konstruejojn videblajn de mia balkono:



Anstataŭigo de la ĉefa kloako

Mia urba registraro administras projekton pri plibonigo de la kloako en mia kvartalo. La projekto daŭros du jarojn. Rekte sub mia balkono la konstruistoj fosas grandan truon en la tero por atingi la tubojn. La grundo estas malmola roko. Dum elfosado, la konstruistoj uzas potencajn hidraŭlikajn borilojn por disigi rokon. Ĝi ne nur faras grandegan bruon, sed profundajn vibrojn, kiuj skuas la konstruaĵon, kie mi loĝas. Bruo... Bruo... Bruo...



Nova nutraĵvendejo kaj oficeja turo

Dum la pasinta jaro, konstruado de nutraĵvendejo kaj oficeja turo komenciĝis antaŭ mia domo. Nuntempe oni klare vidas la malmolan rokon, en kiu aliaj konstruistoj fosas alian truon. Ĉiutage, mi laŭte aŭdis bum-bum-bum. Bruo. Bruo. Bruo.

Nova plurdomturo

Rigardante maldekstren oni vidas novan plurdomturon estante konstruita. La truo estas finita. Nun konstruistoj kunmetas milionojn da pecoj por altigi



Bruo. Bruo. Bruo.



la konstruaĵon. Ĉiutage, sennombraj kamionoj liveras pli da materialoj por la agado.



Ĉc pli da plurdomturoj

lom pli fore estas projekto por konstrui aliajn sep plurdomturojn. La projekto etendiĝas sur tutan urban blokon kaj daŭros multajn jarojn. En la bildo videblas la unua turo... ses pliaj turoj baldaŭ aperos. Bruo. Bruo. Bruo.



Tramvojo laŭ la ĉefa strato

Tiu projekto komenciĝis antaŭ nelonge. La bildo montras trafikkonusojn, kie parto de la laboro okazos. En la venontaj tri jaroj la urbo administros la konstruadon de 18 km longa tramo. La vojo pasos rekte sur la straton apud mia domo. Tagon post tago kamionoj, elkavatoroj, buldozoj kaj ŝoseruliloj funkcios sub mia fenestro elĵetante polvon en la aero, kiun mi spiras. Ne nur bum-bum-bum sed ankaŭ tus-tus-tus. Bruo. Tuso. Frenezo.

Bonvenon en mia urbo, Mississauga, Ontario!

verkis kaj sendis marioo el Kanado

Feliĉo
estas en tio,
ke vi kaj la karuloj
sanas en bon-medio
kaj melodio!

Feliĉo
kuŝas en tio,
ke l' infanoj ĝojkrie
ludas en harmonio
sen apatio!

Feliĉo
venas el tio,
ke l' edzino jam olda
murmuradas je ĉio,
tamen sen krio.

Feliĉo
kreskas el tio,
ke legas Esperante
librojn vi en hobiaj
kaj kun kor-pio!

Feliĉo
nestas en tio,
ke vi kaj kunulino
kuniras por nenio,
sed kun pasio.

Feliĉo
fontas el tio,
ke vi ĉiam kontentas
kaj plendas pri nenio,
ridas al ĉio!

klarigoj:

* laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo
(ĉine: Yijiangnan)
Ĉina fiksfirma poemo,
el kvin versoj de 3,5,7,7,5
silaboj,
kaj laŭ rimaranĝo: a,a,x,a,a
(x=senrima).

KNABO DEMANDAS HUNDON

verkis kaj sendis Gairik Patranobis el Barato

K: Hundo, hundo
kial vi bojas?
Ĉu vi ankaŭ
tiel ĝojas?

H: Ne kara amiko.
Ne nur pro ĝojo.
Estas multaj valoroj
de miaj bojoj.

K: Ĉu vere hundo?
Diru pli multe,
Volas mi scii
tiun aŭskulte.

H: Noktaj gastoj,
kiam ili venas,
mi vidas ĉiujn
ĉar mi promenas.

Tiam mi bojas
por timigi ilin.
Ankaŭ mi klopodas
vekigi vin.

Kiam sur tero
falas sekaj folioj,
komencas mi laŭte
miajn akrajn bojojn.

K: Hundo, hundo –
Komprenis nun mi,
vi estas diligenta
kaj laboras por ni.

H: Dankon dankon
kara mia amiko.
Ankaŭ mi ludas
kun nigra formiko.


K: Vi ne nur estas
kvarkrura besto.
Laboras vi multe
senhavante loĝkeston.

verkis kaj sendis **Gairik Patranobis** el Barato

Papilioj

verkis kaj sendis Helga Plöetner el Germanio

Mia edzo donacis al mi iam en aŭtuno el nia
ĝardeno verdan raŭpon. La kaŭzo estis, ĉar li
rifuzis mian deziron havi katon aŭ hundon, ĉar li
havas katfelalergion. Li suferadis pro nia lasta
kato.



Mi legis en
interreto, ke oni povas
nutri raŭpon kiel
dombesteto, bone por
infanoj.

Mi vidis en
interreto bildojn pri
diversaspektaj raŭpoj
kaj papilioj.

Mi trovis
retadreson pri

specialisto pri papilioj. Ni skribis al li
retleteron. Li respondis afable. Li estis
instruisto pri fako matematiko en gimnazio
kaj hobiaj specialisto pri papilioj. Li donis al
ni konsilojn pro nia verda raŭpo.

Do, mi metis ĝin sur blankan
kuirejopaperon en travideblan keston kun truetoj por
doni aeron. Mi nutris ĝin kun salaton kaj pompecojn kaj
gutojn da akvo.

Ĉiun vesperon ekzakte 21.00 h ĝi vekigis kaj
manĝis. Estis interesa obei ĝin. Dum tagon ĝi dormis
kaj kaŝigis en kaj sub tiu blanka papero.

Mi purigis la keston pro nigraj feketoj. Mi donis de
tempo de tempo freŝan puran paperon kaj freŝan
salaton kun pompecojn.

Ĝuste je la novjara tago mi ne plu vidis mian



Pri la divido per "ses"

Antaŭe, en Turka Stelo 2020.11, numero 59, mi skribis pri la divido per naŭ.

Mi semajntage iras al malproksima laborejo. Ĉirkaŭ unu horo mi devas piediri. Dum tiu tempo, rigardante la numerplatojn (maksimume kvar ciferoj en japanio) de veturantaj aŭ parkantaj aŭtoj, mi provas dividi ilin ekzakte per naŭ por ekzercado de mia cerbo. Sed la dividado kun nur unu cifero, naŭ, ne kontentigis min. Nuntempe, mi volas ŝanĝi la dividanto de naŭ al ses.

Nun, ses estas duoble tri. Du kaj tri estas primoj inter si. Se la originala numero estus dividebla ekzakte per ambaŭ du kaj tri, la numero estus dividebla kun ses. Alivorte, la dividato de ses devas esti para nombro kaj dividebla per tri. Ĉe la unua vido al la numerplato, ni devas distingi, ĉu la numero estas para nombro aŭ ne, kaj ĉu la sumo de ĉiuj ciferoj estas dividebla per tri aŭ ne.

La esoteran taktikon distingi senprokraste mi skribis en la okazo de naŭ. Jene: simpligi la adicon (la nuna celo ne estas la sumo, sed distingi la divideblecon), kaj demeti la ciferojn tri mem aŭ kunmetita tri.

Ni montru ekzemplon!

verkis kaj sendis Kacu Matoba el Japanio

Supozu ke la sinsekvantaj numeroj aperas 1245, 3479, 1638, 0982, kaj 7776. La numeroj estas tute samaj uzataj en la okazo de antaŭa naŭ. La unuaj du numeroj estas malparaj. Do ili estas eliminataj.

Sekve:

1638 => 1+6+8 => 1+8 = 9 (dividebla per 3),

0982 => 8+2 => 10 (nedividebla per 3),

7776 => 3x7+6 (dividebla per 3) .

Ni tuj forlasu la nedivideblan numeron, 0982, kaj memoru la divideblan originalajn numerojn (1638 kaj 7776) inkluzive la ciferan ordonon.

Sekve ni devas dividi ilin mense akurate per ses piedirante. Post la divido ni ricevas la kvocientojn, 273 kaj 1296. De ili, 273 estas malpara, do ĝi ne povas dividiĝi per 6. Aliflanke 1296 estas para, do ĝi povas dividiĝi per 6. La ricevita kvocienco 216 estas pli tri foje dividebla per 6. Surpriziĝe, la originala dividato 7776 estas la kvina potenco de 6.

Nu karaj samedianoj, bonvolu fari tiele cerban gimnastikon per 6 kaj 9. Atente!



verkis kaj sendis **Kacu Matoba** el Japanio

Amika poŝto kun Helga Plöetner



Tulipoj floras
en la ĝarden' de Helga.
Printempa belec'.
Narcis' kaŝe rigardas
el bildo de l' pentristin'.



Printempaj floroj-
bunteco kaj beleco
en la pentraĵo.
Viva estas la natur'
pro la ina sperteco.



Monika pentras.
La am' ne diferencas –
eterna estas.
Monika revas pri la
sama en sia vivo.



Helga
Propra portreto –

verkis kaj sendis Elena Popova el Bulgario

esper' en la okuloj
por sukcesa voj'.
Emocia Animo
kaj ja forta Spirito.



Manfred sur benko
sonĝas sian junecon.
Gaja vizaĝo.
Nostalgio aŭ ĝojo?
Aŭ la Sun' lin karesas?

verkis kaj sendis **Elena Popova** el
Bulgario

Mi estas ebria, mi tion konfesas ... Pardonu, survoje mi eniris en drinkejon kaj trinkis pro la varmeĝo du botoletojn da biero. Varmeĝo estas, filo!

Maljuna Musatov eliris el la poŝo ĉifonon kaj viŝis sian razitan ruĝe-bluan vizaĝon.

—Mi venis al vi, Borenka, anĝelo mia, nur por unu minuto, — daŭrigis li, ne rigardante la filon, pro tre grava afero. Pardonu, eble mi malhelpas vin. Ĉu vi ne havas, mia animo, ĝis mardo dek rublojn? Hieraŭ mi devis pagi por la loĝejo, kaj la mono ... vi komprenas, eĉ se oni mortigus min! ...

Juna Musatov silente eliris kaj post la pordo komencis murmureti kun la mastrino de l'somerloĝejo kaj kun la kolegoj, kiuj kun li komune ĝin luis. Post tri minutoj li revenis kaj silente donis al la patro dekrublan paperon. La maljunulo, ne rigardinte ĝin, malzorge ŝovis ĝin en la poŝon kaj diris:

—Mersi. Kiel vi fartas? Jam de longe ni ne vidis unu la alian.

—Jes, de longe. De Pasko

—Kvin fojojn mi intencis veni, sed neniam mi havis tempon. Jen unu afero, jen alia ... tute ne eble estis! Ce tere, mi mensogas ... ĉion mi mensogis. Ne kredu, Borenka, al mi. Mi diris: marde mi redonos al vi la dek rublojn; ankaŭ tion ne kredu. Kredu nenium mian vorton. Mi faras nenion ... Maldiligenteco, drinkado kaj honto iris sur la strato en tia kostumo, jen estas ĉio ... Pardonu al mi, Borenka. Mi trifoje sendis al vi knabinecon peti monon kaj mi skribis plendajn leterojn. Mi dankas vin pro la mono, sed ne kredu al la leteroj: mi mensogis. Mi hontas vin rabi, mia anĝelo; mi scias, ke vi havas apenaŭ sufiĉe por vi, ke vi mizere vin nutras, sed tia estas mia senhonteco, ke oni povus montradi min por mono! ... Pardonu al mi, Borenka. Mi diras al vi puran veron, ĉar mi ne povas indiferente rigardi vian anĝelan vizaĝon ...

Pasis minuto en silento. La maljunulo profunde ekĝemis kaj diris:

—Regalu min, mi petas, per glaso da biero ... La filo silente eliris, kaj ree eksonis murmureto post la pordo. Post momento oni alportis bieron, la maljunulo vidante la botelojn viviĝis kaj subite ŝanĝis la tonon.

—Antaŭ kelkaj tagoj mi ĉeestis vetkurojn, rakontis li, farante timajn okulojn. — Ni estis tri kaj ni vetis en la totalizatoro tri rublojn. Nia ĉevalo venis unua, ni ricevis po tridek tri rubloj. Mi ne povas vivi sen vetkuroj. Nobla plezuro! Mia maljunulino ĉiam riproĉas min pro la vetkuroj, sed mi iras. Mi amas ilin, faru kion vi volas!

Boris, juna blondulo kun melankolia senmovi vizaĝo, paŝis malrapide el angulo en angulon kaj

aŭskultis silente. Kiam la maljunulo interrompis sian rakonton por tusi, li proksimiĝis al la patro kaj diris:

—Antaŭ kelke da tagoj mi aĉetis ŝuojn, sed ili estas tro mallarĝaj por mi. Ĉu vi ne prenis ilin? por pli malkara prezo?

—Bone — konsentis la maljunulo, farante grimacon, — sed por la sama prezo.

—Jes. La monon vi poste pagos al mi.

La filo rampis sub la liton kaj eliris de tie paron da novaj ŝuoj. La patro demetis siajn maldelikatajn, brunajn, sendube malproprajn ŝuojn kaj komencis provi la novajn.

—Kvazaŭ miaj propraj! — diris li. — Bone, mi prenas ilin. Kaj marde, kiam mi ricevos la pension, mi sendos al vi la monon por ili. Cetere mi mensogas, — daŭrigis li, subite ree per plorema tono. — Mi mensogis pri la totalizatoro, mi mensogas pri la pensio. Ankaŭ vi trompas min, Borenka ... Mi ja divenas vian noblan politikon. Mi trae komprenas vin! La ŝuoj estas tro mallarĝaj por vi, ĉar via animo estas larĝa. Aĥ, Boris, Boris! Ĉion mi komprenas, ĉion mi sentas!

—Vi transloĝiĝis? — interrompis lin la filo por ŝanĝi la temon.

—Jes, mi transloĝiĝis. Ĉiunonete mi tion faras. Mia maljuna kun sia karaktero ne povas longe vivi sur la sama loko.

—Mi vizitis vin en la antaŭa loĝejo por inviti vin kam paron. Pro via sano estus bone por vi vivi iom en freŝa aero.

—Ne! — eksvingis la manon la maljunulo. — Mia edzino ne konsentos, kaj mi mem ne volas. Jam centfoje vi provis eltiri min en la marĉo, ankaŭ mi mem provis, sed sen rezultato. Forlasu tion. Lasu min morti en la marĉo. Jen mi sidas ĉe vi, vidas vian anĝelan vizaĝon, kaj tamen io tiras min hejmen en la marĉon. Tia estas mia sorto. Ne metu sterko-skarabon sur rozon. Ne. Jam tempo estas, filo, por mi; mallumiĝas.

—Atendu momenton, mi akompanos vin. Ankaŭ mi devas esti hodiaŭ en la urbo.

La maljunulo, kaj la filo surmetis la paltojn kaj eliris. Kiam ili post kelke da minutoj sidis en fiakro, estis jam mallume kaj en la fenestroj ekbrilis lumo.

—Mi rabis vin, Borenka! — murmuretis la maljunulo. — Malfeliĉaj, malfeliĉaj infanoj! Granda estas la ĉagreno havi tian patron! ... Boris, mia anĝelo, mi ne povas mensogi, kiam mi vidas vian vizaĝon. Pardonu ... Kia estas mia senhonteco! Mia Dio! Mi ĵus rabis vin, hontigas vin per mia drinkula vizaĝo, morgaŭ mi hontigos same viajn fratojn! ... Kaj se vi vidus min



hieraaŭ! Mi ĝin ne kaŝos, Borenka! Hieraaŭ venis al mia edzino najbaroj, ĉiaspecaj mallaboremuloj, mi drinkis kun ili kaj komencis kalumnii vin, miajn infanojn. Mi insultis vin, plendis, ke vi min forlasis. Mi volis plorigi la ebriajn virinojn kaj kaj ludi rolon de l'malfeliĉa patro. Ĉiam mi faras tiamaniere: kiam mi volas kaŝi miajn malvirtojn, mi kulpigas pri ĉio miajn senkulpajn infanojn. Mi ne povas mensogi al vi, Borenka, kaj kaŝi la veron. Mi iris al vi fanfaronante, sed kiam mi vidis vian delikatecon kaj kompatemon, la lango gluiĝis al la palato kaj en mia konscienco la supro venis suben.

—Ĉesu, paĉjo, ni parolu pri aliaj aferoj.

—Dipatrino, kiajn infanojn mi havas! — daŭrigis la patro, ne aŭskultante la filon. — Kian donacon mi ricevis de Dio! ... Ne ĉifono, kiel mi devus havi tiajn infanojn, sed vera homo kun animo kaj koro! Mi tion ne indas.

La maljunulo demetis sian malgrandan ĉapon kaj kelkfoje faris la signon de l'kruco.

—Gloro estu al vi, Dio! — ĝemis li, rigardante ĉirkaŭe kaj kvazaŭ serĉante sanktan pentraĵon. Rimarkindaj, maloftaj infanoj! Tri filojn mi havas kaj ĉiuj estas samaj. Sobraj, seriozaj, agemaj kaj kiel saĝaj! Veturigisto, kiel saĝaj! Gregorio sola havas saĝon por dek. Li scias francan, li scias germanan lingvon kaj parolas ... kion valoras viaj advokatoj kompare kun li! ... eterne vi dezirus lin aŭskulti ... Infanoj miaj, infanoj, mi ne kredas, ke vi estas miaj! Mi ne kredas. Vi Borenka estas martiro ... Mi ruinigas vin kaj mi ruinigos vin ... Sen fino vi donas al mi, kvankam vi scias, por kio mi elspezas la monon Antaŭ kelke da tagoj mi sendis al vi plendan leteron, priskribis mian malsanon, kaj ĉio estis mensogo: mi petis de vi monon por rumo. Kaj vi donas al mi, ĉar vi timas ofendi min per la rifuzo. Ĉion ĉi mi komprenas kaj sen tas ... Griŝa ankaŭ estas martiro. Jaŭde mi venis al li en la oficejon, ebria, malpura, en ĉifonoj ... odoranta brandon kiel drinkejo. Rekte al li mi venas, tia figuro! ... Mi parolas al li maldelikate, kaj ĉirkaŭe staras liaj estroj, kolegoj, petantoj ... kia honto! Sed li tute ne konfuziĝis, nur iom paliĝis, ekridetis, venis al mi, kvazaŭ nenio okazis, eĉ prezentis min al la kolegoj. Poste li akompanis min ĝis mia hejmo, eĉ per unu vorto ne riproĉis min! Via frato Saŝa, li ja ankaŭ estas martiro! Li edziĝis, vi scias, kun la filino de regimentestro el aristokrata rondo, ricevis doton ... Oni povus supozi, ke mi estas indiferenta por li. Ne, tute ne! Tuj post la edziĝo min unuan li vizitis kun sia juna edzino ... En mia kaverno ...

La maljunulo ekploris, sed tuj ridante daŭrigis:

—Kaj ĝuste tiam mi manĝis rafanon kun kvas kaj rostitajn fiŝojn, kaj en la ĉambro tia malbonodoro estis, ke ĝi naŭzus la diablon. Mi kuŝis ebria, mia maljuna

saltis al la juna paro, kun sia ruĝa vizaĝo ... abomeno, unuvorte. Sed Saŝa ĉion toleris.

—Jes, nia Saŝa estas bona homo, — diris Boris.

—Bonega! Vi ĉiuj estas oraj infanoj: vi kaj Griŝa kaj Saŝa kaj Sonja. Mi vin turmentas, hontigas, rabas, kaj dum mia tuto vivo mi aŭdis de vi neniun riproĉan vorton, mi vidis neniun straban rigardon. Se mi estus bona patro, sed tiel — fil! Nur malbonon vi vidis de mi. Mi estas malbona, diboĉa homo ... Nun, dank' al Dio, mi kvietiĝis, mi ne havas plu fortan karakteron; sed antaŭe, kiam vi estis ankoraŭ malgrandaj, firma volo estis en mi. Kion ajn mi faris aŭ diris, ĉiam ŝajnis al mi, ke tiel devas esti. Ofte el la klubo mi revenis ebria, kolera kaj riproĉis vian mortintan patrinon pro la elspezoj. La tutan nokton mi turmentegis ŝin kaj pensis, ke tiel devas esti. Ofte, kiam vi leviĝis matene kaj iris gimnazion, mi daŭrigis ludi la sinjoron. Dio mia, turmentegis mi la malfeliĉulinon! Se vi revenis hejmen kaj mi ankoraŭ dormis, vi ne kuraĝis tagmanĝi antaŭ mia vekiĝo. Dum la tagmanĝo — la sama muziko! Vi sendube memoras. Al neniun donu Dio tian patron! Por vin provi Dio sendis min al vi. Vere, por provi. Suferu, infanetoj, ĝis la fino. Respektu vian patron, kaj vi longe vivos. Pro viaj virtoj Dio donos al vi longan vivon. Veturigisto, haltu!

La maljunulo desaltis kaj kuris en drinkejon. Post duonhoro li revenis ebria kaj eksidis apud la filo.

—Kie estas nun Sonja? — demandis li. — Ĉu ŝi lernas ankoraŭ?

—Ne, en majo ŝi finis la kursojn kaj nun loĝas ĉe la bopatrino de Saŝa.

—Ho, ho! — miris la maljunulo. — Brava knabino, ŝi similas la fratojn. Ne ĝisvivis, Borenka, via patrino. Aŭskultu, Boris, ĉu ŝi ... ŝi scias, kiel mi vivas?

Boris ne respondis. Silente pasis kvin minutoj. La maljunulo ekploris, viŝis la vizaĝon per sia ĉifono kaj diris:

—Mi amas ŝin, Borenka! Ŝi ja estas mia sola filino, kaj por la maljunulo ne ekzistas pli bona konsolo, ol filineto ... Mi dezirus vidi ŝin. Ĉu mi povus, Borenka?

—Kompreneble, ĉiam kiam vi volas.

—Ĉu efektive? ... Kaj ŝi?

—Ŝi mem serĉis vin por vin vidi.

—Jen estas infanoj! Veturigisto, ĉu ne vere? Aranĝu tion, Borenka, mia kolombeto! Ŝi estas nun délicatesse, consommé kaj ĉio simila, nobela, kaj mi ne dezirus viziti ŝin en miaj abomenaj vestoj. Jen kion ni faros, Borenka: tri tagojn mi ne drinkos, por ke mia ruĝeblua vizaĝo reordiĝu, poste mi venos al vi kaj vi pruntos al mi kostumon; mi min razos, tondigos miajn harojn, poste vi veturos al ŝi kaj ŝin venigos en vian hejmon. Konsentite?

—Bone.

—Veturigisto, haltu!

La maljunulo ree desaltis kaj kuris en drinkejon.

Is Boris atingis kun la patro lian loĝejon, la maljunulo dufoje ankoraŭ desaltis, kaj la filo ĉiun fojon silente kaj pacience atendis. Kiam ili, forlasinte la veturilon, iris tra la longa, malpura korto al la loĝejo, konfuzita kaj embarasita fariĝis lia mieno. Li time kraĉotusis kaj ŝmacis per la lipoj.

—Borenka, — diris li per flata tono, — se mia edzino diros al vi ion, vi ne atentu kaj ... estu des pli ĝentila por ŝi. Ŝi estas maldelikata kaj malrespekta, tamen bona virino. En ŝia brusto batas bona, varma koro!

La longa korto finiĝis, kaj Boris eniris en longan vestiblon. La pordaj hokoj ekkrakis, la venintoj eksentis la kuirejan odoron, la samovaran haladzon kaj ekaŭdis laŭtajn voĉojn. Trapasante la kuirejon Boris vidis nur la fumon, ŝnuron, sur kiu pendis la tolaĵo kaj la tubon de l'samovaro, el kiu supreniris oraj fajreroj.

—Jen estas mia kaverno, — diris la maljunulo, klini- ĝante kaj enirante en malgrandan ĉambreton kun malalta plafono. La atmosfero pro la apuda kuirejo estis terure sufoka. Ĉe la tablo sidis tri virinoj kaj regalis sin reciproke. Vidinte la gaston, ili ekrigardis unu alian kaj ĉesis manĝi.

—Vi ricevis? — demandis severe unu el ili, supozeble la "maljuna" mem.

—Mi ricevis, mi ricevis, — murmuris la maljunulo. — Nun, Boris, sidiĝu, mi petas. Simple estas ĉe ni, ni amas la simplecon.

Li senbezone mastrumis en la ĉambro. Li hontis la filon kaj samtempe li volis kiel ĉiam sin montri senĝena kaj ludi rolon de malfeliĉa, forlasita patro.

—Jes, juna homo, ni vivas simple, sen lukso — murmuris li. — Ni estas simplaj homoj, junulo ... Ni ne amas, kiel vi, fanfaroni ... Jes! Ĉu vi ne trinkus brandon?

Unu el la virinoj (ŝi hontis trinki en la ĉeesto de fremdulo) ekĝemis kaj diris:

—Post la fungoj mi ankoraŭ trinkos ... Ĉu oni volas, aŭ ne, oni devas trinki post ili ... Ivan Gerasimiĉ, invitu la sinjoron, eble ankaŭ li trinkos!

—Trinku, juna homo! — diris la maljunulo, ne rigardante la filon. — Ni havas nek vinon, nek likvoron. Ni amas la simplecon.

—Ne plaĉas al li ĉe ni! — ekĝemis la mastrino.

—Ne grava, ne grava! li trinkos.

Por ne ofendi la patron per sia rifuzo, Boris akceptis la glaseton kaj silente trinkis. Kiam oni alportis la samovaron, li ankaŭ silente, kun melankolia vizaĝo trinkis du glasojn da abomena teo. Silente aŭskultis li

la aludojn de la duonpatrino pri kruelaj kaj senkompataj infanoj, kiuj forlasas siajn gepatrojn.

—Mi scias, kion vi nun pensas, — diris la maljunulo, ree ekscitita per la brando. — Vi pensas: "li falis en marĉon, malfeliĉulo!", sed laŭ mia opinio, mia vivo estas pli normala, ol via. Mi bezonas neniun.. mi ne intencas humiliĝi ... Mi ne toleras, se knabo kompate min rigardas.

Post la teo li preparis haringon kun cepo tiel senteme, ke larmoj de kortuŝo ekbrilis en liaj okuloj. Li ree parolis pri la totalizatoro, pri la gajno kaj pri ĉapelo "panama", kiun li aĉetis hieraŭ por 16 rubloj. Li mensogis kun sama apetito, kun kiu li manĝis la haringon kaj trinkis. La ilo sidis silente unu horon kaj komencis adiaŭi.

—Mi ne kuraĝas peti, ke vi restu — diris fiere la maljunulo. — Pardonu, juna homo, ke mi ne vivas, kiel vi volas! Adiaŭ, juna homo, — daŭrigis li per la sama tono, akompanante la filon al la vestiblo.

—Atande!

Sed en la malluma vestiblo, li subite premis la vizaĝon al la maniko de l'filo kaj esploris.

—Se mi povus vidi Sonjan! — murmuris li. — Aranĝu tion, Borenka, mia anĝelo! ... Mi min razos, metos vian kostumon ... estos serioza ... Mi silentos en ŝia ĉeesto. Vere mi silentos!

Li time rigardis al la pordo, post kiu estis aŭdeblaj la voĉoj de la virinoj, ĉesis plori kaj diris laŭte:

—Adiaŭ, juna homo. Atande!

A. Ĉeĥov

Fonto: "Internacia Krestomatio" de Kabe



Solvo de la krucvortenigmo

N	O	I	N	O	J		O	N	E	R	G	
O	L		O	M	O		V	I	T	V	S	
N	O	Ĝ	N	V	R	V	I	T	O	F		
O	K		O	R	E	C	S	I	V		I	
	J	O	M	G	I	N	E		E	E	R	
	O	N	J	V	M	E	S		N	U	K	
O	B	A	R	V	N	O	T	O	K		N	U
B		O	D	V	S	V	P		I	U	T	

Plano

„Kiu preparis por vi la planon de sukceso?“

Unue mi pensis, ke la junulo ne alparolas min. La demando ŝajnis al mi sensenca.

„Nu, la plano de sukceso. Vi devas ĝin havi, ĉar vi estas fama, ĉu ne?“

„Kia plano?“

„Ne diru, ke neniu skizis ĝin al vi... mi pagis je ĝi centon da miloj!“

Mi ne plu komprenis. Por mi la realo estis simpla: la patro kaj patrino ie trafas kaj donas al vi nur tion, kion ili havas. Poste vi kreskos, studos, kolektos spertojn, tio kostas kelkajn batojn, frapojn de la gepatroj kaj de la vivo mem, sed tio kostas eĉ ne moneron. Do, poste vi dum 30 jaroj ion faras kaj klopodas tion fari plej bone, vi laboras kiel frenezulo kaj se vi havas ŝancon, ke iu pagas je via laboro... neparole pri nervoj, pri malkresko de fortoj, pri konfuzoj kaj eraroj – tion vi certe komprenas: senpaga estas nenio. Sed cent mil! Damne! Je kio? Al mia laborego?

„Mian planon prilaboris dram-verkisto el televido,“ orgojlis junulo „mi pretas esti kantisto.“

„Kian ĝenron vi kantas?“ mi demandis ĝentile.

„Ne gravas.“ Li estis preskaŭ ofendita. „Komence mi serĉas truon en la merkato. Eble onidire speciala programero por gejoj, laŭ la plano de sukceso.“

„Vi estas gejo?“

„Ne, kial?“ Li okulumis. „Grave estas havi araneaĵon. Unu homo altiros vin en destinitan ĵurnalon, alia en televidspektaklon, sed ankoraŭ ne en „Primetin“, ĉar vi devas unue atingi alian homon en preciza momento, kiam la afero bezonas plifortigon per skandaleteto. Nu, eble ekzemple ke mi ŝatas infanetojn aŭ mi dormas en la lito kun kaprino.“ Li ekridis: „Kiel alie vi volas akiri sukceson?“

La frosto kisis min. Ĉu mi mem vivas en konfuzo? Ĉu fakte ĉio en la vivo jam longe funkcias renverse? Ne, unue krei ion kaj poste iomete puŝi tion, sed prefere prizorgi sin persone – kaj poste eble eĉ fari nenion? Eble hodiaŭ oni faras tion ne nur en arto, sed en politiko, en ŝtata servo, simple ĉie? Ĉu la samon faras tiu dramaturgo, kiu el tiuj „planoj de sukceso“ por aliaj, kreis propran sukceson? Ĉu tio donas garantion, ke se mi ne sukcesos, oni redonos monon?

„Ĉu via plano funkcias?“ mi demandis.

„Ne tro. Do, mi pensis, ke vian planon konstruis iu pli lerta...“

Mi eksentis kompaton: „Faris,“ kaj mi levigis serioze montrofingron.

„Nu,“ li malgaje klinis la kapon „vi havas kontaktojn... kaj mi... eble mi... ĉu?“



Dum unu horo en fremda haŭto

La titolo iel konfuza, sed vera. Ne temas pri nova televida konkurso, eĉ ne pri sciencfikcia filmo. Nur en Bruselo unu organizo pri homarismo kaptis brilan ideon – montri lude al la civitanoj de EU la sorton de forkurinto. Oni elektas la identecon de la eskapulo el iu difinita lando (eblecoj estas naŭ), ekzemple el Sierra Leone, oni pagas ĉirkaŭ ducent kronojn (7 Eŭroj). Vi venos en ĉambron, kie vi rolos dum unu horo sinjoron aŭ sinjorinon NENIU. Dek ses profesiaj aktoroj traktas kun vi per tubo de mitraleto, per frapoj, vi plenumas montojn da formularoj, ili malŝatas vin, ĉantaĝas, traktas sarkasme, ironie, ofice... nu, kiam vi estas plene humiligita kaj ili puŝas vin en la normalan vivon, vi ankoraŭ povas legi la surskribon adiaŭan: Por vi tio finiĝis post la horo, sed tio ne estas la nura horo por personoj, kiuj devis fuĝi de sia lando.

La ideo estas brila kaj konvenega ankaŭ ĉe ni. Tamen, mi rekomendas malgrandan plibonigon. Cetere ni estas nacio de plibonigantoj, ĉu ne? Mi proponus ne unu ludon, sed serion. La pago por la biletoj estus libervola, sed la partopreno deviga.

Vi demandas por kiu? Ja, tio estas simpla respondo, vi provu diveni, kiu bezonas roli ekzemple la ludon: akiri stirpermeson, kuraci sin je la asekura pago en banloko, peti socialan subtenon, adopti infanon, la hipotekon facile kaj rapide, serĉi loĝejon por juna familio, kiel vivteni sin de pensio, ktp., ktp...

Do, ĉu vi deziras roli, ludi?

KVĚTY – la plej ŝatata semajna ĉeĥa gazeto por la tuta familio 6 / 2002
Ĉefartikolo „Vorto de la ĉefredaktoro“, paĝo 3

Fonto: Legolibreto 2 de Jindřiška Drahotová

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI

 RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO
 Eldonanto : Turka esperantistaro
 Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds